

# La Riverego


Aŭtuno-vintro 2020 — printempo 2021 | Jaro 36-37, No 142-144  
Esperanto-Societo Kebekia, kunlabore kun Kanada Esperanto-Asocio  
esperanto.qc.ca | esperanto.ca

La fino de erao — lasta numero de  
*La Riverego* en tiu ĉi formato

*La fin d'une époque : le dernier numéro  
de La Riverego dans ce format*



2022: Montrealo atendas vin!





**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2011 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 101

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Joyeux Zamenhof-tag!**

Le 23 aŭgusto, les espérantoistes du monde entier célèbrent la naissance de Zamenhof. C'est aussi l'occasion de vous transférer au pays d'Ésperanto. Quel est le rôle d'Esperanto pour améliorer nos vies? Comment utiliser ce langage pour découvrir une nouvelle façon de communiquer et de découvrir une nouvelle façon d'explorer le monde? Les espérantoistes du monde entier célèbrent la naissance de Zamenhof. C'est aussi l'occasion de vous transférer au pays d'Ésperanto. Quel est le rôle d'Esperanto pour améliorer nos vies? Comment utiliser ce langage pour découvrir une nouvelle façon de communiquer et de découvrir une nouvelle façon d'explorer le monde?

**Felicitu Zamenhof-tagon!**

La 23-an de aŭgusto, esperantistoj tute la mondo festas la naskotage de Zamenhof. Ĝi estas la oportuno por translokiĝi al la lando de Esperanto. Kio estas la rolo de Esperanto por plibonigi niajn vivojn? Kio estas la rolo de Esperanto por malkovri novajn manierojn de komunikado kaj de malkovro de nova manieroj de esplorado de la mondo? La 23-an de aŭgusto, esperantistoj tute la mondo festas la naskotage de Zamenhof. Ĝi estas la oportuno por translokiĝi al la lando de Esperanto. Kio estas la rolo de Esperanto por plibonigi niajn vivojn? Kio estas la rolo de Esperanto por malkovri novajn manierojn de komunikado kaj de malkovro de nova manieroj de esplorado de la mondo?

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2011 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 101

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Bienvenue à MEKARO durant la Semaine du mai!**

**Bonvenon al MEKARO (12-13 marto) dum la semajno de majo!**

**33-paĝa!**

**Avec l'esperanto en Turquie! Kun Esperanto en Turkio!**

**Ilia Malkovro de Japanio**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2011 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 101

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Ilia Malkovro de Japanio**

**Mia Malkovro de Japanio**

**Ma découverte du Japon**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2011 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 101

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Reveno al Trivero**

**A trois Rivières de nouveau!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2011 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 101

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Rememoroj pri ARE**

**Souvenirs de l'ARE**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**MEKARO 2012: bonvenon al Kebeko!**

**MEKARO 2012: bienvenus à Québec!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**MEKARO-2012 en Kebeko: En la « menu »: esperanto, biero, turismo... kaj serĉado de perdita amikino!**

**MEKARO-2012 à Québec: Au programme: l'espéranto, la Bière, le tourisme... et la recherche d'une amie perdue!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Mia Malkovro de Japanio**

**Ma découverte du Japon**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Esperanto-societo kebekia festas sian 30-jariĝon!**

**La société québécoise d'espéranto fête son 30<sup>ème</sup> anniversaire!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**MEKARO 2013: Bienvenue à Ottawa!**

**MEKARO 2013: Bonvenon al Otavo!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Ukraino... en Japanio!**

**L'Ukraine... au Japon!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**La Tero de Espero**

**La terre d'espérance**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Tri semajnoj ĉe Ōomoto**

**Trois semaines chez Ōomoto**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**La ĉiela kastelo**

**Le château céleste**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Kun amikoj en Serbruĉo**

**Avec des amis à Sherbrooke**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Venu sciuri en Montrealo!**

**Venez écurer à Montréal!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**La UEA-representantoj scias en Montrealo!**

**Les représentants de l'UEA écurer à Montréal!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Kioto: la sekretoj de la malnova ĉefurbo**

**Kyoto: les secrets de l'ancienne capitale**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**La centima kongreso mundiala d'esperanto en Lille**

**La centième congrès mondial d'espéranto à Lille**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Ĉe la fino de la tero**

**Au bout du monde**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Amikeco Norde-Sude**

**Amitié nord-sud**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**105-a Universala Kongreso Montrealo 2020!**

**105<sup>e</sup> Mondial d'espéranto: Montréal 2020!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**Zamenhof en Nord-Ameriko kaj Montrealo**

**Zamenhof en Amérique du Nord et à Montréal!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**La plej granda Esperanto-festo: Montrealo-2020!**

**105<sup>e</sup> Mondial d'espéranto: Montréal 2020!**

**La Riviero**  
REVUE ESPERANTISTA INTERNACIONALE

Numero 2012 Esperanto-Societo Kebeko Jano 17, No. 102

Referencoj de la artikolo 3-7, 10-12, 17, 18  
 Ekmanaj artikoloj 14, 19  
 Literaturaj artikoloj 15, 16, 17-18  
 Menciadoj de artikoloj 13, 14, 15, 16, 17, 18

**La plej granda Esperanto-festo: Montrealo-2020!**

**105<sup>e</sup> Mondial d'espéranto: Montréal 2020!**



# Dek jaroj da *Riveregoj* : fiere, danke, iom triste...

## *Ĵenja Amis*

Jen, karaj amikoj ! Estas tempo por plia paĝoturno en mia vivo kaj en la vivo de ESK – venas al la fino la ĉi-formata eldono de nia bela revuo de ESK, *La Riverego*, kiun mi redaktis de 10 jaroj !

Mi transprenis la redaktadon en 2010, tuj post kiam mia edzo Joel kaj mi translokiĝis en Kanadon kaj kelkajn jarojn post kiam mi emeritiĝis kiel redaktoro de *Kontakto*. Mi transprenis *La Riveregon* kiel organizan bultenon, sed iom post iom ĝi fariĝis plena soci-kultura revuo legata ĉie tra la mondo. Mi ĝojis ricevi viajn varmajn komentojn post ĉiu dissendado de la revuo – la reagoj venis ne nur de Kebekio, sed vere de ĉie tra la mondo. Ili kuraĝigis min kaj varmigis mian koron.

Mi aparte fieras, ke la revuo Esperanto nomis *La Riveregon* modela organiza bulteno, kaj ke gravaj E-instruistoj rekomendis ĝin kiel legaĵon al lernantoj. Dum lastaj jaroj *La Riverego* ankaŭ estis la montrofenestro por Montrealo prepare al la Montreala UK, kaj dum la lastaj du jaroj ĝi ankaŭ fariĝis portempa revuo de KEA, Kanada Esperanto-Asocio, fidela partnero kaj kunlaboranto de ESK.



Mi ankaŭ ĝojas pri tiu ĉi kunlaboro kaj pri la fakto, ke dum iom da tempo *La Riverego* fariĝis ne nur kebekia, sed ankaŭ tutkanada revuo.

Rigardante reen al la 10 jaroj, mi vere sentas grandan fieron, kaj mi esperas, ke vi ĉiuj, karaj legantoj – kebekianoj, kanadanoj kaj ĉiuj mondanoj — sentas la saman fieron. Mi ankaŭ sentas multe da dankemo al ĉiuj, kiuj verkis por *La Riverego*, kaj ankaŭ al niaj plej fidelaj provlegistoj, Francisko Lorrain, Silvano Auclair kaj pli lastatempe Bob Williamson. Ili faris mirindan laboron provlegante kaj konsilante min – vortoj ne sufiĉas por esprimi mian dankemon al vi, karaj helpantoj ! Dankegon, dankegon, dankegon !


La decido retiriĝi de la redakta laboro, kiel vi jam komprenis, ne estis spontana – ĝi estis planita jam de kelkaj jaroj. Mia ideo estis fari la plej grandan kaj belan lastan numeron de mia deĵorperiodo post la fino de la Montreala UK. La pandemio ŝanĝis niajn planojn – kiel vi tre bone scias, la montreala UK estis movita al 2022. Sed mi kredas, ke mi tamen sukcesis fari la plej grandiozan numeron de mia redakta tempo – 70+-paĝan

rekordan RivereGon ! Montrealo, Kebekio kaj la tuta Kanado vere brilis dum la Monda Festivalo kaj la Virtuala Kongreso de UEA, kiu anstataŭigis la Montrealan kongreson en 2020. Ĉi tiu jaro estis rekorda por ESK ankaŭ rilate eldonaĵojn : libroj, poŝtkarto kaj la unua E-poŝtmarko en Kanado ! Ĉi-numere vi trovos plenan spektron de artikoloj pri la eldonaĵoj kaj la bunta virtuala somero. Atendas vin intereseĝaj artikoloj ne nur el Kebekio kaj Kanado — notu aparte TRI artikolojn rilatajn al Kanado kaj Kebekio sed verkitajn de niaj karaj samideanoj el Hispanio : de Xavi Alcalde, José Antonio del Barrio kaj Eduardo Berdor. Mi aparte dankas ilin pro tiuj ĉi belaj kontribuoj.

Kio do okazas ekde nun, vi eble demandas. *La Riverego* fariĝos bunta blogo en la retejo de ESK —

[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca). Kio signifas, ke ni DAŬRE bezonas viajn kontribuojn ! Sendu viajn artikolojn, recenzojn, opiniojn al [riverego@esperanto.qc.ca](mailto:riverego@esperanto.qc.ca). La membroj de ESK kaj la abonantoj de RiveReto (la reta bulteno de ESK) regule ricevos ligilojn al ĉiuj novaj artikoloj (kaj se vi ankoraŭ ne abonas RiveReton, nepre abonu ĝin ĉe [www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)). Povas esti, ke ESK faros jaran almanakon de la aperintaj artikoloj (por membroj kaj amikoj de la asocio, kaj ankaŭ por kebekiaj kaj kanadaj naciaj arkivoj). Ne forgesu, ke vi povas trovi ĉiujn numerojn de la tuta historio de *La Riverego* en la retejo de ESK (sekcio [Eldonaĵoj](#)). Fartu bone — kaj ĝis revido en Esperantujo !

**Spektu [20-minutan intervjuon](#) de Nicolas Viau kaj Ĵenja Amis en la YouTube-kanalo de ESK.**





# Ni daŭre strebu altigi nian scipovon de Esperanto !

*Francisko Lorrain*



Per tiu ĉi numero *La Riverego* alvenas al iuspeca vojkruĉiĝo. Ĝenja Amis jam de pluraj jaroj kreeme, efike kaj sindediĉe

redaktadis la revuon. Ekde la venonta numero, la revuo transiros al alia formato (blogu).

Mi ŝatus profiti la okazon por iom klarigi, kial mi akceptis provlegi la revuon antaŭ ĉiu aperigo.

Unue direndas, ke tiun taskon, sufiĉe postulan, mi dividas kun Silvano Auclair ; miapercepte, ni bone kompletigas unu la alian. Kaj mi certas, ke li de jaroj plenumadas tiun taskon pro motivoj similaj al la miaj.

Esperanto, malgraŭ siaj pluraj malfacilaĵoj, multrilate ja pli simplas ol iu ajn nacia lingvo. Per diligenta studado kaj multa legado, oni post kelkaj jaroj ja povas atingi gradon sufiĉe altan (sed kompreneble neniam kontentigan) de kompetenteco, ĝenerale pli rapide ol pri ajna nacia lingvo. Kompreneble, preskaŭ neniu el ni regas Esperanton tiel bone kiel sian propran

nacian lingvon. Nome, malmultegaj el ni havis la ŝancon lerni la internacian lingvon denaske, uzi ĝin ĉiutage dum sia tuta vivo en ĉiuspecaj kuntekstoj por ĉiuspecaj taskoj aŭ celoj, kaj studi ĝin dum jaroj en ĉiunivelaj lernejoj. Mi mem ne estas inter tiuj malmultaj elstaruloj : tute evidentas al mi, ke mi multe pli bone regas mian denaskan francan, kaj eĉ la anglan, kiun mi eklernis kiel trijara infano antaŭ 1950, ol Esperanton, kiun mi lernis nur en 2003.

Tiu relativa facileco de la internacia lingvo multajn prave entuziasmigas, jam dum la unuaj tagoj aŭ monatoj de lernado. Fakte estas, ke, ĉe nia lingvo, komencanto relative rapide atingas nivelon sufiĉan por pli-malpli flue konversacii pri multaj ĉiutagaj temoj. Tiu grado de flueco aperas konsiderinde pli frue post la eklernado ol ĉe aliaj lingvoj. Tio estas ja miriga trajto de Esperanto. Spertinte tion, multaj esperantistoj ekdeziras tuj aktivi iel aŭ tiel en la movado. Tiun emon oni povas nur laŭdi. Tiuj aktivuloj multon kontribuas. En la movado, estas ni malmultaj, preskaŭ ĉiuj volontuloj, kun limigita disponebla tempo. Ĉiu, kiu havas motivon kunagi, bonveniĝu !

Sed enestas kaptilo en tio. Ĝenerale, tro da esperantistoj konsideras, ke ne tro gravas, se ili malperfekte aŭ eĉ fuŝe parolas la lingvon : oni parolu kiel ajn, oni ĉiam sukcesas iel tiel kompreniĝi ! Nu bone, por multaj celoj tio sufiĉas.

Kaj jen la kaptilo : por multaj aliaj celoj, tio ne sufiĉas ! Ni konsciu, ke tia difekta lingvouzo ne taŭgas por altnivela, preciza internacia komunikado. Mem malbone paroli kaj skribi la lingvon dum jaroj kaj jaroj, ne vere strebante pliboniĝi, kaj samtempe celi ĝian universalan disvastiĝon ŝajnas al mi tute ne serioze. Krome, reklami Esperanton kiel facile lerneblan, kiam oni mem malbone regas ĝin — t.e. ne vere lerninte ĝin mem —, ŝajnas al mi trompo. Pardonu la akrajn vortojn, sed tion necesas malferme diri.

Evidentas, ke nur altnivela rego de la lingvo permesas la verkadon de valoraj literaturaj, sciencaj, filozofiaj aŭ eseaj verkoj, ekzemple. Tiaj verkoj multe altigas ne nur la kulturalan nivelon de nia komunumo, sed ankaŭ la potencialan prestiĝon de Esperanto ! Ni tro ofte nur baraktas kun la lingvo. Pardonu min, sed ni devas agnoski, ke tro da homoj inter ni verkas, tradukas, poezias, podkastas, publike elpaŝas, sen esti sufiĉe bone lernintaj nian lingvon. Se ili aŭdus iun ajn tiel fari en ilia propra nacia lingvo, tiun ili primokus aŭ

energie kritikus. Kiam mi legas aŭ aŭdas tian Esperantan lingvaĵon, ĉu ĉe junaj homoj, ĉu ĉe veteranoj, mi ne povas deteni min iom honti pri mia esperantisteco...

Tamen neniu el ni pro tio ĉesu aktivi, kompreneble. Sed, eĉ aktivante, ni daŭre konsciu pri niaj lingvaj mankoj, kaj daŭre strebu, almenaŭ iugrade, ampleksigi nian scipovon de la lingvo. Ni legu literaturon aŭ bone redaktitajn revuojn (kiel *La Riverego* — kiun mi aŭdacu mencii ĉi-kuntekste —, aŭ *La Gazeto*, *Literatura Foiro*, *Monato*, *Esperanto*, *La Ondo de Esperanto*, ktp), aŭ ni ĉeestu kursojn meznivelajn aŭ altnivelajn, ni aŭskultu kun aktiva sinteno lingve altnivelajn podkastojn (kiel ekzemple tiuj de Pola Retradio), ni spektu videaĵojn de Esperantaj teatraĵoj aŭ de prelegoj de niaj plej renomaj korifeoj (kiel Humphrey Tonkin, Anna Löwenstein, István Ertl, Renato Corsetti, Jorge Camacho kaj multaj aliaj), ni uzu materialojn disponigitajn ĉe edukado.net, kaj tiel plu. Ne mankas la rimedoj !

Tiuj kelkaj konsideroj espereble komprenigas, kial gravas por mi kontribui al la disvastigo de pli riĉa, ĝusta kaj preciza uzado de nia lingvo.

*Redaktora noto : La Ondo de Esperanto ĉesis aperi ĉi-jare, tamen ekzistas tre ampleksa kaj tre leginda [arkivo](#) !*

# Mesaĝo de la prezidanto de Kanada Esperanto-Asocio

*Paul Hopkins, Prezidanto de KEA*

Ni eniris la jaron 2020 anticipante grandan ĝojon pro sukcesa agado : Kanada Esperanto-Asocio havis novan estraron, novan retejon, vigan eldonadon (kadre de kunlaboro kun la redakcio de *La Riverego*), kaj ĉiuj signoj indikis, ke dum tiu ĉi jaro okazos granda kaj sukcesa Universala Kongreso en Montrealo. Klare, ni ne antaŭvidis, ke estos pandemio...

Malbonŝance, okazis pandemio, kaj pro tio ne povis okazi la UK en Montrealo. Bonŝance, la organiza komitato por UK Montrealo pretis plulabori, kaj Universala Esperanto-Asocio akceptis nian peton prokrastigi la kongreson ĝis 2022. Kaj kvankam la okazigo de surlokaj Esperanto-eventoj en Kanado nuliĝis por protekti la sanon de kanadaj esperantistoj, okazis kaj okazadas interretaj renkontiĝoj de kanadaj

esperantistoj, iuj regulaj (ekzemple, en Victoria, Toronto kaj Kebekio), aliaj sporadaj (ekzemple, en Kalgario, Otavo kaj Halifakso). KEA profitas de akiritaj spertoj pri interreta komunikado por

unuafoje okazigi tutkanadan interretan kunvenon de kanadaj esperantistoj. Ĉi tiu evento, kiu okazos la 21-an de novembro (2020), donos al kanadaj esperantistoj okazon lerni de la sperto de tri movadaj eminentuloj (Duncan Charters, Mark Fettes kaj Katalin Kováts), ekkoni multajn kanadajn esperantistojn kiel ankaŭ aŭdi pri la

agado de nia asocio kaj helpi al ni direkti ties estontan evoluon. Mi esperas, ke kiel eble plej multaj legantoj de ĉi tiu mesaĝo partoprenos la Kanadan Interretan Renkontiĝon 2020 ! Por aliĝi, vizitu [mallonge.net/kvk2020](http://mallonge.net/kvk2020)

## Kanada Virtuala Kongreso



**Kio?** KVK estas la unua virtuala kongreso de Kanada Esperanto-Asocio (KEA)

**Kiam?** 21-an de novembro 2020, ekde 13:30 orienta tempo / 10:30 pacifika tempo

**Kiel?** KVK okazos per Zoom (ligilo venos post via aliĝo)

Kiu prelegos? Duncan Charters (prezidanto de UEA), Mark Fettes, Katalin Kovats, montreala LKK kaj pli!

**Ne maltrafu** tiun ĉi unikan okazon konatiĝi kun aliaj esperantistoj en Kanado, interŝanĝi spertojn, aŭdi interesegejn prelegojn de gravuloj kaj lerni pli pri la Movado!

**Ĉiuj informoj kaj aliĝilo (senpage):** [mallonge.net/kvk2020](http://mallonge.net/kvk2020)

# Prezidanta raporto : jaro 2019-2020

*Nicolas Viau, prezidanto de Esperanto-Societo Kebekia*

*Prezentita dum la jarkunsido, vendredon, la 25-an de septembro 2020*

## Enkonduko

Ĉi tiu jaro estis tre malfacila kaj portis multajn defiojn kaj ŝanĝojn, pro la KOVIM-19-pandemio.

La Universala Kongreso en Montrealo, kies LKK estas formita de ESK-anoj, same kiel granda parto de la kontribuontaro, devis esti prokrastita al 2022.

La unua ŝanĝo por ESK estis la devigo starigi virtualajn kunsidojn, kiel por preskaŭ ĉiuj asocioj.

Multaj sopiras al ĉeestaj kunvenoj, sed la momento ankoraŭ ne alvenis bedaŭrinde. Tamen virtualaj kunvenoj ebligas la partoprenon de multaj homoj, eĉ de aliaj landoj.

## Eldonado de libroj

Novaj libroj estis eldonitaj. Dankon al Normando, Zdravka kaj Trefleo (kiel tradukinto) pro iliaj streboj en tiu agadkampo.



Pluraj prelegoj okazis kadre de la Monda Festivalo de Esperanto (MondaFest') de UEA, de Normando Fleury pri sia *Besta Verbaro* kaj de Zdravka Metz pri la Esperanta traduko de *Maria Chapdelaine*, kaj de Francisko Lorrain pri *La Eta Princo* kaj ĝia aŭtoro *Antoine de Saint-Exupéry*. Espereble tio helpos reklami la librojn, kiuj nun estas ĉiuj

aĉetebraj de la Societo — krom *La Eta Princo*, aĉetebla de KEA.

## MondaFest'

ESK kaj membroj de ESK (kiel LKK-anoj) ankaŭ multe kontribuis al diversaj eroj – aparte programeroj rilate al Montrealo, Kebekio kaj Kanado – de MondaFest', kaj aparte al la Virtuala Kongreso (VK) de Esperanto, okazinta je la samaj datoj, kiam devis okazi la prokrastita Universala Kongreso en Montrealo. Ni ankaŭ sukcese ricevis salutmesaĝojn de Valérie Plante kaj Georges Sioui



(pritraktitajn de Normando kaj mi).

Ni ŝuldas aparte multajn kontribuojn dum la VK al Ĵenja Amis, interalie pro belega virtuala ekskurso tra Montrealo kaj pro la Amerika saluto.

Ankaŭ dankon al la jutubisto BigBong pro lia laboro por esperantigi tre originalan videaĵon de promenado tra Montrealo motorcikle, kun la helpego (kiel tradukistoj) de Bob Williamson kaj Trefleo Mercier.

Dankojn ankaŭ al multaj aktivuloj, kiuj helpis krei aŭ kunmeti erojn aŭ kiuj, kun mi, ĉeestis dum prezentaj prelegoj pri Montrealo (formalaj kaj neformalaj) dum la VK, aparte la membroj de la LKK : Normando Fleury, Ĵenja Amis, Joel Amis, Garry Evans.

*Tago de Ameriko* : okazis mallonga sinprezento de ESK (reprezentata de mi), kune kun sinprezento de KEA (reprezentata de Bob Williamson), Francisko Lorrain prelegis pri Antoine de Saint-Exupéry, Zdravka Metz prelegis pri Zamenhof en Nordameriko, kaj Ĵenja Amis

prelegis pri Montrealo kaj distris la partoprenantaron per kvizo.

Antaŭ kelkaj tagoj Normando Fleury, estrarano de ESK, sukcese plantis arbon kun ŝildeto en la franca kaj Esperanto en Granbeo, kadre de la kampanjo Monda arbo-plantado.

## Cele al la UK en Montrealo-2022

Kvankam ne propra agado de ESK, membroj de ESK (kiel LKK-anoj) sukcese daŭre apogis kaj daŭre apogas la UK-n, nun prokrastitan al 2022.

Ni aparte reliefigu la poŝtkartan kampanjon « 2022 por 2022 », starigitan danke al la agado de Ĵenja Amis, por instigi la tutmondan esperantistaron donaci 2022 € por apogi la organizadon de la UK, kaj la rilatan eldonitan

poŝtmarkon, okaze de tiu kampanjo.

Ni ankaŭ notu la apogon de Kebekiaj esperantistoj al la starigo de la Interkultura Novela Konkurso, organizita de ALE, sub aŭspicioj de UEA, kies gajnintoj estos prezentataj dum la UK en

esperanto2020.ca/eo/kanada-virtuala-kinejo/

### KANADA NACIA ARTO: FILMA ARTO!

La kanada nacia sporto estas hokeo. La kanada nacia simbolo estas acerfolio. Kaj la kanada nacia arto estas... filmarto! Multegaj mondaj registoroj kaj animacianoj veras de Kanado, kaj Kanado bonfamas havi Nacian Filmoŝtation de Kanado (INFO - france: ONE angle: NFB) - ikonan registaran institucion, kiu produktas filmojn kaj animaciojn, kiel gajnis centojn kaj centojn da premioj, inkluzive de 12 Oskaroj (la fondinto de NFO eniris en la historion, interalie, kiel persono, kiu inventis la vorton "dokumentfilmo"). La LKK por Montrealo UK planis okazigi Kongresan Kinejon dum la kongreso en 2020. Bedaŭrinde, ni ne povas fari tion ĉeestee en 2020 - ni faros tion en 2022, kompreneble! Intertempe, ni invitas vin ĝui la Kanadan Virtualan Kinejon dum MondFest! Ni planas aperigi, inter junio kaj septembro, 22 filmojn, por omagi diversajn flankojn kaj kulturojn de Kanado kaj de la mondo.

Jenja Amis

**19-a de junio: "Junideka" festo**  
Cu vi scias, kio estas "Junideka" (ingliŝe) ...  
13/06/2020

**21-a de junio: Kanada Tago de Indigenaj Popoloj**  
La Nacia Tago de Indigenaj Popoloj estas festata en Kanado por...  
15/06/2020

**24-a de junio: Kebekia Nacia Tago**  
La 24-an de junio en Kebekio oni festas la Nacian Feston...  
16/06/2020

**1-a de julio: Kanada Tago**  
La 1-an de julio en Kanado oni festas la "Feston de la Kanada Tago".  
17/06/2020

**Kongresa temo: Najbaroj de McLaren - monda heredaĵo de Haseko: ŝlaŭmo** - Esperanto!

**Kongresa temo: kontraŭkoloniisma mesaĝo de La Seĝa Rakonto (Il était une chaise / A Chairy Tale)**  
Tiu ĉi filmo, alie, estas la ŝlaŭmo de la...

Montrealo.

ESK-anoj ankaŭ daŭre apogos la komunikan laboron ĝis la evento.

## **Kluba biblioteko**

La klubaj libroj nun estas en la domo de Esperanto de Tririvero. Suzano Roy prizorgos la starigon de tiu nova kluba biblioteko. Oni pripensos manieron alirebligi la librojn. La domo estis fermita dum la pasintaj monatoj pro la pandemio.

## **Komunikado**

Ni devis komence de la pandemio trovi taŭgan ilon por rete kunveni. Post kelkaj provoj de Zoom, ni nun alvenis al la uzo de la senpaga sistemo Jitsi. Ni eble poste provos la komercan version de ĝi, 8x8, laŭnecese.

Freŝigo de la retejo : mi komencis prilabori freŝigon de la retejo, laŭ sugesto de Ĵenja Amis, tiel ke ĝi havu pli modernecan interfacon/ aspekton.

## **La Riverego kaj blogo**

Kiel jam anoncite en la RiveReto, post jardeko kiel redaktoro, Ĵenja Amis forlasos tiun respondecon.

La celo estas transiri al tute reta formato (blogo) por konservi kanalon por novaĵoj kaj artikoloj, samtempe malaltigante la laborkvanton.

Mi elkore dankas al Ĵenja pro ŝiaj elstaraj kontribuoj kiel redaktoro de la Riverego kaj pro ŝia preteco apogi la komunikajn celojn de la Societo per aliaj rimedoj estontece.

## **Ŝanĝoj en la estraro**

Ni reliefigu la kontribuojn de Suzano Roy, kiu deĵoris dum pluraj jaroj kiel estrarano, kaj plej laste kiel vicprezidanto de ESK, kaj demisiis ĉi-printempe. Ŝi ankaŭ multe kontribuis al la LKK kiel ĉeforganizanto de la ekskursa programo. Suzano cetere daŭre agadas por Esperanto kaj ESK kiel posedanto de la Esperanto-

domo en Tririvero kaj ankaŭ kiel prizorganto de la kluba biblioteko.

Konforme al la regularo de la Societo, la ceteraj estraranoj invitis membron, nome Garry-on Evans, deĵori en la estraro ĝis la venonta elekta jaro (2021). Ni danku al li pro lia preteco kontribui al la estraro, interalie pri financaj temoj.



**Garry Evans**



# Ĉio iros bone : la unua E-poŝtmarko en Kanado !

*Ĵenja AMIS*

**Jen du belaj aldonaĵoj al via kolekto : la ĉielarkaj poŝtkarto kaj poŝtmarko de espero el la jaro 2020 : la jaro, kiam ni bezonas esperon, eble, eĉ pli ol iam ajn antaŭe !**

Meze de aprilo mi verkis artikolon por la revuo *Esperanto* pri tio, kion traspertis la Montreala UK komence de la pandemio, kaj la decido prokrasti ĝin. Tiam mi skribis, ke nia kongreso eniris en la historion, sed ne kiel ni pensis...

Malfeliĉe, la evento, kiun ni planis de tiom longe, en kiun ni investis tiom da amo, tempo kaj dediĉo – la UK-2020 – eniris en la tre longan liston de neokazintaj kongresoj...

La solaj du okazoj, kiam jam planitaj kongresoj ne okazis, estis ambaŭfoje pro militoj. La unua planita, kaj neokazinta kongreso, estis la UK-1914 en Parizo, kiu estis nuligita pro la eksplodo de la Unua mond-milito kaj la dua en 1967, Tel-Avivo, pro la Sestaga milito (dum la militoj kongresoj ne estis planitaj, kaj ne

okazis, kompreneble). La pariza UK estis inaŭgurita kaj tuj fermita, kaj la Israela kongreso estis movita al Roterdamo, nur semajnojn antaŭ la UK – alivorte, ĝi ja okazis, sed en tute alia formo,

alia lando kaj malsama teamo. Tel-Avivo havis sian UK-on 33 jarojn post tiu prokrastita de 1967, nome en 2000. Parizo gastigis la UK-on en 1932 : do, 18 jarojn post 1914.

Nia situacio en Montrealo estis iom malsama – ni sciis jam ekde aprilo ke la ĉeesta UK-2020 ne povos okazi, pro la pandemio (la unuan fojon en la

historio, ne pro milita kaŭzo). Krome, la Montreala LKK estis ankaŭ tiu, kiu proponis al UEA prokrasti ĝin ĝis du jaroj – kaj la UEA-estraro akceptis tion. Al la montreala UK aliĝis iom pli ol 820 personoj



kelkajn semajnojn antaŭ la fino de la dua aliĝperiodo – oni povus supozi, ke temus pri kongreso de ĝis 1500-1800 partoprenantoj aŭ eĉ iom pli.

Mi rakontu kiel venis al ni la ideo pri la poŝtkarto kaj poŝtmarko. Ĉi-printempe, kiam Esperanto-Societo Kebekia transiris al virtualaj kunvenoj, kara amiko nia, Randy Dean el Atlanto, venis al unu el tiuj kaj demandis, ĉu ni planas eldoni poŝtkarton por la UK-2020 – t.e. la prokrastita UK. Kompreneble, por la ĉeesta UK ni planis fari tutan aron da objektoj. Interalie, ni intencis eldoni poŝtkarton, poŝtmarkon kaj eĉ aranĝi specialan stampon – sed ĉu eldoni ion por la ne-okazonta UK ? Antaŭ tiu ĉi demando ni eĉ ne pensis pri tia oportuno – sed tiu ideo eldoni specialan poŝtkarton ĝuste por 2020, kiam la fizika UK ne okazos, « kaptis » min – mi pensis, ke vere indas fari ion tian : por historia memoro, por ĉiuj kolektantoj, por tiuj, kiuj planis veni al



Montrealo, kaj por ni, la LKK mem.

Kiam mi klarigis ĉion ĉi al la LKK, la reago estis miksitaj – kelkaj opiniis, ke eldono de poŝtkarto por 2020 malfermos la vundon, kaj pli bone ne fari. Mi pensis male : la poŝtkarto povas esti pozitiva, esperodona kaj rigardanta al 2022. Mi

ankaŭ petis al Elda Doerfler, la prezidanto de Esperanto-Ligo Filatelista (ELF), konsilon – kaj ŝi senhezite subtenis. (Mi poste lernis de la prezentaĵo de James Rezende Piton dum la Virtuala Movada Foiro, ke la du aliaj neokazintaj UK-oj ankaŭ havis poŝtkarton kaj glumarkon – kaj ke

tiu estas raraĵoj nun.) Ĉar en la Montreala LKK ni estas tre permesemaj, kaj se iu teamano volas fari ion kaj pretas mem labori pri tio – oni ricevas la verdan lumon – do, mi komencis dezajni !

Sur la poŝtkarto vi vidas la ĉielan linion de Montrealo kaj ĉielarkon – la ĉielarko, kompreneble, fariĝis la universala simbolo de



kuraĝo kaj espero en la tempo de koronaviruso – en Montrealo kaj tutmonde. Sur la karto estas skribite : « 2022 : Montrealo atendas vin » – ja ni ĉiuj esperas, ke ĉiuj, kiuj planis viziti la urbon en 2020, tion ĉi faros – kaj ke ankaŭ tiuj, kiuj ne planis veni en 2020, tamen eble venos en 2022.

Sur la dorsa flanko estas

la fama citaĵo de Zamenhof : « Nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, ni iru la vojon celitan ! » – estas citaĵo, kiu donis la kuraĝon kaj esperon al ni, la LKK, kaj ni esperis, ke ĝi ankaŭ donos kuraĝon al ĉiuj esperantistoj, kiuj vidis la karton. La emblemo de la montreala UK

aperas ĉirkaŭita de ronda ĉielarko, kaj ankaŭ la adreslinioj formas ĉielarkon. La emblemon dezajnis la konata esperantisto Francisco Luis Veuthey (Francĵo), profesia grafikisto kaj dezajnistoj, loĝanta en Nederlando. Francĵo dezajnis la plejparton de la emblemoj de la UK-oj en la lastaj jardekoj. Notu, ke ĉiuj proporcioj de la konstruaĵoj sur la emblemo kaj la monto


respektas ilian realan grandon kaj proporciojn unu al la alia. Ni aparte fieras kaj ŝatas nian montrealan emblemon kaj dankas al Francĵo.

La poŝtkarto estas ĉ. 15 cm x 10 cm alta (6 x 4 koloroj laŭ nord-amerikaj mezuroj). Ĝi estas el kartonpapero (14 punktoj, de tipo C2S), kaj ĝia

fronto estas lakita, kun koloroj ambaŭflanke. La poŝtkartoj estis printitaj en Kanado (ni produktis mil ekzemplerojn).

Kiam la dezajno estis preta kaj mi montris ĝin al la LKK, jam ne plu estis miksitaj sentoj – ĉiuj unuanime ŝategis ĝin, kaj ĝojis, ke mia obstino tamen gvidis al tiu ĉi bela produktaĵo. Tiam ni decidis eldoni ankaŭ la

poŝtmarkon de Espero, por kompletigi la poŝtkarton. Mi pensis, ke la ĉielarko kun la vortoj « Ĉio iros bone », plus la urbo kaj la jaro (Montrealo – 2020) estus taŭgaj por la poŝtkarto. Tio, fakte, estis la vortoj kaj la bildo, kiun ni afiŝis en Facebook, kun la klarigo pri la prokrasto de la UK, kaj mi kredas, ke ili kaptis la korojn de



esperantistoj. Ĝi estas, efektive, la unua kanada poŝtmarko en Esperanto (la Vankuvera UK havis glumarkon, sed ne la poŝtan markon). Mi mem desegnis la ĉielarkon kaj skribis la vortojn – la desegnaĵon, cetere, mi donacis por la aŭkcio de la Virtuala Kongreso, por profitigi UEA-n (aĉetitan kontraŭ 65 eŭroj fare de komitatano B por Kanado, s-ro Guy Matte).

Mi uzis la servon « Picture Postage/Timbres-photos » de la Kanada Poŝt-servo ([www.picturepostage.ca](http://www.picturepostage.ca)), kiu permesas mendi speciale faritan poŝtmarkon. Ni mendis 250 poŝtmarkojn (5 foliojn de 50 poŝtmarkoj sur ĉiu folio de 21.5 x 28 cm). La grandeco de unu poŝtmarko estas 4 cm larĝaj kaj 2.5 cm altaj (la grandeco de ordinara poŝtmarko en Kanado estas ĉ. 2.5 x 2 cm – do, la speciale menditaj poŝtmarkoj estas pli grandaj ol la ordinaraĵoj).

En Kanado ekzistas tri specoj de poŝtmarkoj : enlandaj (t.e., kiuj validas ene de Kanado), Usonaj

(t.e., ili iras al ĉiuj partoj de Usono) kaj internaciaj (al ĉiuj aliaj landoj). Enlandaj poŝtmarkoj estas « eternaj » : t.e., ili ne havas la prezon sur si, kaj ĉiu enlanda poŝtmarko en Kanado validas por ĉiam. Je la momento de la skribado, la kosto de unuopa poŝtmarko por Kanado estas 1.07 kanadaj dolaroj (0.92 dolaroj se vi aĉetas dekon da poŝtmarkoj, en rulaĵo aŭ kajero). La prezo estas la sama por letero aŭ poŝtkarto. La indiko, ke temas pri enlanda poŝtmarko, estas acerfolio kun litero « P » en ĝi.

La usonaj markoj kostas iom pli : 1.30 kanadajn dolarojn. La internaciaj poŝtmarkoj kostas 2.71 kanadajn dolarojn. En la kazo de usonaj kaj internaciaj poŝtmarkoj, la prezo povas altiĝi – kaj se ĝi altiĝas, oni devas aldoni aliajn markojn por trafi la nunan prezon. Notu, ke oni povas ankaŭ

simple uzi plurajn kanadajn poŝtmarkojn kaj por Usono kaj internacie : en la kazo de Usono, oni





povas simple alglui du kanadajn enlandajn markojn (eĉ se oni perdas iom da mono, farante tion), aŭ simple uzi tri kanadajn markojn, se oni sendas internacie. Do, pro tio ni mendis nur kanadajn markojn, ĉar ĝi ja bone kombiniĝas kun aliaj specialaj poŝtmarkoj, aŭ kun la ordinaraj kanadaj poŝtmarkoj. Ekzemple, se mi devas sendi el Kanado la poŝtkarton al Italio, mi algluos la specialan « ĉielarkan » poŝtkarton, plus du ordinarajn kanadajn poŝtmarkojn. Kompreneble, la kosto de la speciale menditaj poŝtmarkoj estis pli alta ol tiu de la ordinaraj markoj.

Ni jam uzis plurajn poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn por la kampanjo « Poŝtmarko de Espero », invito donaci al la montreala UK kaj ricevi kiel donaceton poŝtkarton subskribitan de unu el LKK-anoj (se oni donacas 22 eŭrojn) aŭ de la tuta LKK (se oni donacas 100 eŭrojn). Je oktobro 2020 ni jam atingis pli ol 75% de nia celo : 2022 eŭroj por la jaro 2022 – ĉiu kolektita mono uziĝos por la UK-2022. Legu pri la kampanjo ĉi tie : [Montrealo-2022: poŝtkarto de espero! – 105-a Universala Kongreso de Esperanto](#). Ni invitas ankaŭ vin partopreni en tiu ĉi bela kampanjo kaj montri al la montreala UK vian subtenon.

Ni planas vendi la poŝtkartojn kaj poŝtmarkojn dum la UK en Belfasto en 2021 kaj en Montrealo

en 2022 per la libroservo de UEA. Antaŭ tiam, vi povas aĉeti ilin rekte de ni, la Montreala LKK (vi povas sendi monon al [g.evans@esperanto2020.ca](mailto:g.evans@esperanto2020.ca) aŭ viziti la paĝon <https://esperanto2020.ca/eo/posxtkarto> por fari kreditkartan pagon – plej sube). Vidu sube la prezojn (al kiuj aldoniĝos la sendokostoj). Se vi ŝatus akiri aliajn kvantojn, aŭ se vi volas, ke la poŝtmarkoj NE estu algluitaj jam, kontaktu la montrealan LKK-on ([ikk@esperanto2020.ca](mailto:ikk@esperanto2020.ca))

## Prezoj

*Unuopaj ekzempleroj :*

- ★1 poŝtkarto : 1 eŭro
- ★1 poŝtmarko : 2 eŭroj
- ★1 poŝtkarto + 1 poŝtmarko : 3 eŭroj

*Pakaĵoj :*

- ★15 poŝtkartoj (sen poŝtmarkoj) : 10 eŭroj (t.e., rabato je 1/3)
- ★5 poŝtkartoj + poŝtmarkoj (poŝtmarkoj algluitaj sur la poŝtkartojn) : 10 eŭroj (t.e., rabato je 1/3)

*Unue aperis en la revuo Verda Lupeo, de ELF-AREK (Esperanto-Ligo Filatelista kaj Amika Rondo de Esperantaĵ-kolektantoj).*

# Tutmonda arbo-plantado de UEA : Kebekia eldono !

*Normando Fleury*

Fine de la MondaFest' 2020 de UEA estis lanĉita fare de brazilano Fernando Maia Jr., vicprezidanto de UEA, la kampanjo « Mil arboj plantitaj de esperantistoj tra la mondo ». La intenco estas ligi la Esperanto-movadon al la celo de UN pri daŭripova evoluo.

Vi scias kiel mi, ke la planedo bezonas pli bonan zorgadon. Maniero helpi al tio estas konkrete agi plantante arbojn mondscale. Ĉar la esperantistaro estas vaste disvastigita, ni povus tiel montri al la instancoj de UN, ke nia movado povas ĉie loke agadi.



Tiucele, la 23-an de septembro, en la naturcentro ĉe lago Boivin (CINLB) en la kebekia urbo Granbeo (Granby) mi donacis kaj plantis arbon. Mi elektis indiĝenan arbon, amerikan sorbuson (*Sorbus*

*americana*), ĉar ne taŭgas planti ekzotikan arbon en naturcentro. Cetere, la arbo estis plantita en ĝardeno dediĉita al birdoj. Sorbusoj produktas fruktojn abunde kaj ties fruktoj longe restas aŭtune en la arbo. La



fruktoj utilas por dikigi migrantajn birdojn (merlon, mokbirdon, ktp) antaŭ ilia longa migrado.



Jen tio, kion mi diris dum la ceremonio : « Dankon por via ĉeesto okaze de la nacia tago de arbo en Kanado. Mi estas Normand Fleury kaj kiel junulo agadis kun grupo da gejunuloj por savi la marĉon, kie ni troviĝas nun. Post kelkaj jaroj, la loko fariĝis naturcentro kun vasta protektita areo. Kvindek jarojn poste, kiel emeritulo, mi kreis ĝardenon por la birdoj. Danke al brazilano, Fernando Maia, kiu iniciatis kampanjon inter esperantistoj de la mondo, ni nun plantas arbon. En 2020, UN festas sian 75-jariĝon. Estas kampanjo, por ke Esperantistoj plantu milon da arboj tra la mondo subtene al la celo de daŭripova agado en UN. Mi dankas la instancojn de CINLB, kiuj akceptis mian ideon kaj kunlaboris por ĝia okazigo. »



Plantoskulptaĵo *La viro, kiu plantis arbojn*  
(Montrealo) [el Vikipedio]

## Kampanjo por Tutmonda Arbo-plantado (TAP)

*Fernando Maia Jr., Vicprezidanto de Universala Esperanto-Asocio*

**Malfermiĝo** : la 20-an de septembro 2020

**Fermiĝo** : la 24-an de oktobro 2030 (UN-datreveno)

**Celo** : 1000 arboj ĝis 2030, t.e. po 100 arboj ĉiujare

Kiel partopreni : vi povas planti aŭ plantigi arbon en via loĝregiono aŭ okaze de iu evento. Sendu fotojn kaj informojn pri tiu agado al Fernando Maia Jr. ([fmaiajr@gmail.com](mailto:fmaiajr@gmail.com)), al Normand Fleury ([normandfleury@gmail.com](mailto:normandfleury@gmail.com)) kaj al la redakcio de la revuo *Esperanto* ([redakcio@revuoesperanto.org](mailto:redakcio@revuoesperanto.org)), kiu povos publikigi vian agadon tie aŭ en la *Reta Revuo* ([revuoesperanto.org](http://revuoesperanto.org)).

Kiel subteni : bonvenas donacoj al la Fondaĵo Klimato ([uea.org/alighoj/donacoj/co2](http://uea.org/alighoj/donacoj/co2)) – tio helpos al UEA subteni arbo-plantadon tra la mondo. Ankaŭ aliĝo al UEA bonvenas, ĉar (re)aliĝo de membroj tenas la Asocion finance kapabla subteni tiun kaj aliajn agadojn ([uea.org/alighoj/alighilo](http://uea.org/alighoj/alighilo)).

# Eldonaĵoj de ESK 2020

*Zdravka Metz, Francisko Lorrain*

Multaj belaj eldonaĵoj estas preparitaj de ESK por 2020, la jaro, kiam ni devis gastigi la UK-on. La UK prokrastiĝis je du jaroj, sed vi ne devas atendi du jarojn por aĉeti la eldonaĵojn – ĉiuj informoj kaj la maniero aĉeti troviĝas en la retejo de ESK : [www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj](http://www.esperanto.qc.ca/eo/eldonajhoj).

## MARIA CHAPDELAINE

Aŭtoro : Louis Hémon. Tradukis en Esperanton :

Trefflé Mercier

Prezo : 14 kanadaj dolaroj


Rakonto el franca Kanado. 201-paĝa

La franca verkisto Louis Hémon priskribas la vivon de la familio Chapdelaine komence de la 20-a jarcento en Kebekio, kiam la francaj pioniroj konkeradis la teritorion norde de Péribonka. Legante, oni konatiĝas kun la malfacila vivo de junaj viroj, kiuj forhakas netuŝitajn arbarojn en la vintra sezono :

« ... dum la neĝo, la malvarmo, la vento, la furiozaj torentoj sieĝas lin,

izolas lin kaj trudas al li iun lukton preskaŭ sen paŭzo. Li uzas sian vivon por vivi. »

(El la Antaŭparolo franca de Émile Boutroux, de la Franca Akademio.)  
... « kaj pri pena laboro sur la tero por semi kaj planti mangaĵojn de la printempo ĝis la aŭtuno por nutri la familion. Tamen ekzistis vesperoj de ĝojo, kiam familianoj, najbaroj, geamikoj kuniĝadis, por interŝanĝi la novaĵojn pri konatoj, familianoj ; kiam ili muzikis, dancis kaj kantis havante plezuron. Tiam la unuaj amsentoj ĉe la juna Maria estis malsamaj ol hodiaŭaj ; tiam la demando estis, ĉu resti sur la tero, daŭrigi la konatan vivon, aŭ foriri al





Usono, kie la vivo pli facilas en industriaj urboj kun klimato pli agrabla. Maria devis fari gravan decidon. Ŝi cerbumis, pri kial resti – por kaj kontraŭ... »

Ŝi diris : « Ni venis antaŭ tricent jaroj kaj ni restis... Tiuj, kiuj kondukis nin ĉi tien povus reveni inter nin sen amareco kaj ĉagreno, ĉar, se estas vere, ke ni ne lernis multon, certe ni forgesis nenion. »

Historia romano eldonita en 1916 en Montrealo, kiu fariĝis populara en Kanado kaj en Francio, estis tradukita en multajn lingvojn, kaj nun en la 15-an lingvon : Esperanton.

## **BESTA VERBARO**

Aŭtoro : Normando Fleury, helpe de internacia esperantistaro, antaŭparolo de Humphrey Tonkin, ilustris Renaud Ducharme-Gilbert, eldonis Esperanto-Societo Kebekia, junio 2020.

La verbaro prezentas 38 verbojn rilatajn al bestoj, kiel « krokodili ». La 47-paĝa verbaro estas plene kolora.

Prezo : 15 kanadaj dolaroj, triona rabato por mendo de pli ol 5 ekzempleroj.




Originala verko de Normando Fleury. El la konata en Esperantujo verbo « krokodili », kaj la verbo « sciuri » kreita dum la IJK en 1994 en Montrealo, Normando kunigis pliajn tridekses bestonomajn verbojn. Li okazigis diskutrodojn dum pluraj IJK-oj kaj aliaj renkontiĝoj, kie oni kune kreis novajn verbojn.

Amuzaj koloraj desegnaĵoj, faritaj de la grafikisto Renaud Ducharme-Gilbert, bildigas al vi la signifon de la verboj. La desegnaĵoj, kun ofte integritaj verdaj steletoj, interesos eĉ etajn infanojn. Tiu libro povas servi por ili kiel aktiviga bildlibro : ili ja ŝatos ludi

serĉante steletojn en ĉiu paĝo.

La libreto amuze invitas vin lingve uzi la verbojn... almenaŭ dum IJK, ĉar tie neniu ofendiĝos, se vi tion faros.

Profito el vendado iros al TEJO (Tutmonda Esperantista Junulara Organizo).



## **BIRDOJ EN NIA KORTO**

Aŭtoro : Zdravka Metz

Prezo : 30 kanadaj dolaroj

Originale verkita en Esperanto, la libro estas kolekto da rakontoj dividitaj en du temojn.

*Birdoj en nia korto* estas unu el dek du rakontoj pri la naturo.

La aŭtoro malkovras novan aktivecon : observi la birdojn. Sed ŝi ankaŭ rakontas pri eventoj en kontakto kun aliaj bestoj : ĉevaloj, prociono, hundo, testudido.

En la dua parto de la libro sekvas dek ok rakontoj pri vojaĝoj. La verkistino rakontas pri la oftaj helpemaj esperantistoj, kiuj, dum ŝiaj vojaĝoj kaj tiuj de aliaj, « etendis la manon » en situacioj neplanitaj kaj neagrablaj, en kiuj tamen ĉio bone finiĝis.

La rakontoj, inspiritaj de veraj okazaĵoj, estas dediĉitaj al ŝiaj genepoj. Zdravka feliĉas dividi

siajn rakontojn kun aliuloj. Kompare kun ŝia unua libro *Bestoj en nia domo*, kiu celis junajn infanojn, la nuna libro kontentigos pli aĝajn junulojn.

La libro, edukcela kaj informplena, finiĝas per vortareto kun la nomoj de birdoj kaj geografiaj nomoj de urboj, lagoj, landoj, kiujn ŝi esperantigis por faciligi la fonetikan legadon.

## **Tri antaŭaj eldonaĵoj**

### **KRISTNASKAJ RAKONTOJ EL FRANCA KANADO**


Aŭtoro : Louis Fréchette (1839–1908). Franclingva originalo : *La Noël au Canada ; contes et récits* (Toronto, George N. Morang, 1900). Dua, reviziita Esperanta eldono, kun la originalaj ilustraĵoj de Frederick Simpson Coburn. Traduko de Vincent Beaupré, reviziita de Francisko Lorrain kun la helpo de internacia temo. Eldonis Esperanto-Societo Kebekia, 2013

Prezo : papere 23, elektronike 14 kanadaj dolaroj.

Estas tre interesa la *Antaŭparolo de la aŭtoro por la anglalingva eldono de 1899*. Malfacile troveblas pli bonaj vortoj por priskribi la libron de ses rakontoj kaj 16 ilustraĵoj, ol tiuj de la aŭtoro mem.



« *Mi havis du celojn. La unua estis trovi novtipan distraĵon, kaj la alia, fari ion por popularigi, inter homoj legantaj nur la anglan, tiun porcion de la amerika grundo nomatan franca Kanado, kun ĝiaj karakterizaj trajtoj devenantaj el ĝia klimato siaspeca, kaj precipe el ĝiaj loĝantoj, kies lingvo, konduto, kutimoj, tradicioj kaj popolaj kredoj portas esceptan stampon, kaj tial verŝajne vekas apartan intereson ĉe la ĉirkaŭantaj loĝantaroj. Por atingi ĉi-lastan celon, mi provis, per kelkaj plumskizoj, transdoni ian ideon pri la sovaĝa rigoro de niaj vintroj, metante kontraŭ ili, laŭvice, niajn bravajn pionirojn de la arbaro, niajn aŭdacajn aventuristojn de la Nord-Okcidento kaj niajn fortikajn dresistojn de riveraj glacioplatoj, kies pasintaj prodaĵoj iom post iom forgesiĝas pro la invadanta progresado. Mi klopodis elvoki iujn el la malnovaj legendoj, revivigi iujn pitoreskajn homtipojn de antaŭ longe, kies lingvaĵo, kutimoj, kostumoj kaj superstiĉaj agmanieroj delonge malaperis, aŭ rapide malaperadas ».*



geografiaj nomoj.

## NANATASIS

Aŭtoro : Robert Dutil. Franca originalo : Nanatasis. Tradukita el la franca de pluraj anoj de ESK.

La tradukojn kunigis Zdravka Metz, reviziis Edmond (Kajmo) Brent, kaj eldonis Esperanto-Societo Kebekia en 2005.

La vorto Nanatasis estas la nomo de la ĉefa rolulino, juna aŭtoĥtonino. La signifo de

Zdravka Metz, en sia Antaŭparolo por tiu libro, skribis :  
 « *Rakontado estis granda tradicio en Kebekio. Dum la lastaj jaroj, pluraj artistoj sukcese provis revivigi ĉi tradicion. Ŝajnas al mi, ke eble ĉi libro povus esti realigo de la deziro de la aŭtoro kaj tradukinto diskonigi la franckanadajn tradiciojn al anglalingvaj najbaroj kaj eksterlandaj samideanoj ».*  
 Sur la lastaj paĝoj troviĝas listo de prononcindikoj de francaj vortoj kaj indekso de Esperantaj


Nanataŝis, en la abenaka lingvo, estas « kolibro » kaj ankaŭ « transformiĝanta ».

La libro konsistas el dudek rakontoj, kiel fabeloj, sur 112 paĝoj.

Soleca kanuanto decidas esplori grandan arbaron de la Alagaŝa regiono veturante sur rivero komence de aŭgusto, kiam la vetero belas kaj la kuloj estas malpli voremaj. Komence li ĝuis sian esploradon, tagon, sunon, renkontitajn bestojn. Unuloke, li devis transiri viglan akvofluon, sed li estis jam laca kaj li urĝe bezonis ripozi, sed...

La kanuanto priskribas sian vekiĝon pere de zumado de kolibro, post la akcidento kaj vundiĝo. Li sentis sunon, doloron ĉe la kapo, brakoj kaj ŝultro. La kanuo estis haltinta ĉe granda ŝtono, sed pro sia vundiĝo li ne plu kapablis remi. Tiel li renkontis la junulinon Nanataŝis.

Ŝi vivas en pura naturo — naturo netuŝita de homo. La junulino provas kuraci kaj nutri la fremdulon laŭ sia tradicia maniero. Nanataŝis, tre scivolema, starigas multajn demandojn pri la



moderna civilizacio. La edukita kanuanto respondas al ŝiaj plej diverstemaj demandoj.

Nanataŝis plej miras pri armeoj kaj militoj, kiujn ŝi ne konas, parolante pri interkonsento kaj helpo de unu homo al la alia.

*« La traduko estas flua, akompanas ĝin dudeko da allogaj tutpaĝaj koloraj bildoj, reproduktitaj de akvarelaj pentraĵoj. Malkutima verko, konvena ankaŭ por junuloj. »*

*Recenzis Stefan MacGill*

Post la rakontoj troviĝas dupaĝa abenaka-Esperanta glosaro, kiu klarigas la signifojn de la abenakaj vortoj uzitaj en la rakontoj.

## LA ETA PRINCO

Aŭtoro : Antoine de Saint-Exupéry (1900–1944).  
Franclingva originalo : *Le petit prince* (New York, Reynal & Hitchcock, 1943, poste Parizo, Gallimard, 1946). Tria, reviziita Esperanta eldono, kun la originalaj ilustraĵoj de la aŭtoro. Traduko de Pierre Delaire, reviziita de Francisko Lorrain, kun la helpo





de plurhoma internacia teamo. Eldonis Kanada Esperanto-Asocio, 2010.

Prezo : 15 kanadaj dolaroj ene de Kanado, 18 ekster Kanado. Informiĝu ĉe [esperanto.ca/index.php/la-eta-princo-eo/](https://esperanto.ca/index.php/la-eta-princo-eo/).

Tiu monde konata kaj disvastigita verko de Saint-Exupéry estas tre

ŝatata de plej diversaj homoj el ĉiuj aĝoj. Ĝi postulas, kaj meritas, tre zorgan tradukadon. Tiun taskon entreprenis la tria-eldona teamo. Malgraŭ sia modesta prezo, tiu eldono estas altkvalite enpaĝigita kaj presita.

Saint-Exupéry estis pionira franca aviadisto, famiĝinta pro siaj pluraj libroj, belege verkitaĵoj, en kiuj li priskribis siajn profesiajn spertojn kaj enpensiĝis pri ili. Li verkis nur unu libron celantan infanojn, *La Eta-n Princo-n*, kiun tamen tuj ekŝatis multegaj plenkreskuloj. *La Eta Princo* estas eldonita de Kanada Esperanto-Asocio (KEA).

*De la redakcio* : Francisko Lorrain, kiu kunordigis la eldonon de *La Eta Princo* kaj de Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado prelegis du-foje pri tiuj ĉi eldonaĵoj dum MondaFest' ! Kadre de #mondafest2020, UEA anoncis tiun ĉi eventon la 29-an de junio, okaze de la datreveno de la naskiĝo de Antoine de Saint-Exupéry. La 31-a de julio aliflanke estas la datreveno de la lia mistera forpaso -- ĝuste en tiu ĉi tago okazis la prelego pri *La Eta Princo*, kiun kunordigis Akademio Literatura de Esperanto. Spektu ĝin ĉi tie : <https://youtu.be/NeKangYruds>.

La prelego pri Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado spekteblas en la YouTube-video de la Tago de Ameriko : <https://youtu.be/IAeaTnP1tFM> (ĝi komenciĝas je la 2-a horo 22 minutoj).



# Literatura Konkurso *KOVIM-19 : Kiel ĝi ŝanĝis nin*

La Akademio Literatura de Esperanto, kun aŭspicio de UEA, organizas literaturan konkurson, kiu celas instigi aŭtorojn de diversaj kulturaj fonoj verki novelojn pri la sama temo, kiu tamen spegulos malsamajn vidpunktojn, malsamajn historiojn. La konkurso nomiĝas Interkultura Novelo-Konkurso (INK). Ĝin iniciatis montrealaj esperantistoj, kaj la prezidanto de la konkurso estas Francisko Lorrain, el Montrealo.

La temo de la konkurso ***KOVIM-19 : Kiel ĝi ŝanĝis nin*** estis elektita post reta publika voĉdonado. Do kiel ĝi ŝanĝis vian vivon aŭ la mondon ? Ĉu vi kapablas verki fikcian rakonton pri tio ? La temo povas fariĝi inspiro por verki fikcian rakonton okazantan en la pasinto (dum la unuaj – kelkfoje frenezaj – monatoj de la pandemio), aktuale (kiam pandemio iĝis preskaŭ kutima afero de la vivo) aŭ en la estonteco (post jaroj, jardekoj aŭ eĉ pli... kia estos nia mondo ?)

Proponoj devas nepre esti en Esperanto kaj neniam antaŭe publikigitaj, tamen ili ne nepre devas esti originale verkitaj en Esperanto. Tradukaĵoj el aliaj lingvoj estos bonvenaj. Tial la



konkurso povus esti interesa okazo por aranĝi kunlaboron kun neesperantistaj verkistoj.

La noveloj povas havi maksimume 12 mil karaktrojn (proksimume 6 paĝojn). La minimuma longo ne estis definitiva. Limdato por sendi verkojn estas la 20-a de junio 2021.

Interkultura ĵurio elektos la gajnantajn novelojn. La gajnintoj estos anoncitaj dum la 107-a Universala Kongreso de Universala Esperanto-Asocio en Montrealo en 2022. La 1-a, 2-a kaj 3-a premioj estos respektive 500, 300 kaj 200 eŭroj. La konkurso-rikolto estos legebla en rete publikigita novelaro.

La lanĉo de la konkurso okazis la 20-an de septembro 2020, dum la [Printempa Inaŭguro](#) de la Monda Festivalo de Esperanto (spektu ekde 1 horo 50 min). Dum ĉi tiu ceremonio, INK estis prezentita de s-ro Nicola Ruggiero, komitatano de la Akademio Literatura kaj sekretario de la konkurso kaj la temo de la konkurso estis prezentita de d-ro José Antonio Vergara, ĉilia fakulo pri epidemio-scienco kaj publika sano. Trovu ĉiujn detalojn kaj la formularon [ĉi tie](#).



# Mia Somero Kiel Kolibro

*Garry Evans*

Ekestis nova vorto en Esperantujo dum la pandemio: « kolibri ».

Kolibro estas eta birdo, kiu flirtas rapidege de unu floro al alia por gustumi ties nektaron. Ĝi ne staras sur la petalo kiel faras abeloj sed restas enaere kaj nur metas en la floron sian longan bekon por mallonge gustumi la enhavon, kaj tiam tuj flugas al la sekva alloga floro.

Same faris mi – kaj fakte multaj aliaj – dum Esperantaj eventoj ĉi-somere. Mi saltis de unu renkontiĝo al alia (ofte okazantaj samtempe), de prelego al prezentaĵo, de koncerto al babilejo, por ĝui la bongustegan enhavon.

Inter aprilo kaj oktobro mi partoprenis en la Nord-Amerika Somera Kursaro (NASK) – eĉ dufoje, ĉar oni organizis specialan kurson ankaŭ en oktobro – en la Somera Esperanto-Studado (SES), en la

naciaj kongresoj de Irano, Aŭstralio, Usono, Koreio (kaj baldaŭ Kanado), en la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Teknologio (KAEST), en la jarkongreso de la Sennacieca

Asocio Tutmonda (SAT), kompreneble en la Virtuala Kongreso, VK (kiu « anstataŭigis » la Universalan Kongreson de Esperanto, okazanta en Montrealo), kaj en multaj aliaj aranĝoj. Vera ret-kolibro, ĉu ne ?

Kaj mi tute ne estis la sola. Mi ofte vidis en tiaj aranĝoj la

samajn entuziasmajn Esperantistojn, el Rusio, Portugalio, Usono, Brazilo kaj multaj aliaj landoj. Kaj mi certe ne estis la plej multokupita kolibro. Dank' al la relative nova retejo, Eventa Servo ([eventaservo.org](http://eventaservo.org)), oni povas facile kontroli, kiajn aranĝojn okazos en Esperantujo ĉiutage. Kelkaj el miaj « kunkolibrantoj » ŝajne partoprenis ĉiun alireblan virtualan eventon en Esperantujo, ĉar mi



renkontis ilin ĉie kaj ĉiam.

Kompreneble, la koronavirusa pandemio estis (kaj bedaŭrinde ankoraŭ restas) granda tragedio por la homaro. Sed ĝi ankaŭ havas sian pozitivan flankon. Mi kontaktis ĉi-jare plurajn malnovajn amikojn (ankaŭ ekster la Esperanto-mondo), kiuj loĝas en disaj landoj tra la mondo kaj sukcesis babilu kun ili post longa paŭzo sufiĉe ofte per Zoom.

Kaj por Esperantujo la pandemio estis granda defio, sed ankaŭ samtempe senprecedenca ŝanco. La diversaj Esperantaj aranĝoj tre rapide iĝis virtualaj. La teknologio de virtualaj eventoj ne estas perfekta sed, dank' al la streboj de E@I, kiu aranĝis la plejparton de la plej gravaj kongresoj, kaj de la Irana Esperanto-Asocio, kiu kunordigis multajn Zoom-renkontiĝojn, ĝi funkciis sufiĉe glate.

Kaj kiaj mirindaj travivaĵoj ! Mi povis sperti la Iranan landkongreson sen iri al Irano (eble tikla afero, se oni volas poste eniri Usonon). Mi

partoprenis en SES (kiu devis okazi en Ĉeĥio) kaj en la Usona landkongreso la saman tagon – sen moviĝi de antaŭ mia komputilo. Mi dum du semajnoj en julio povis ĝui la saĝecon de la

prezidanto de UEA, Duncan Charters, kiu gvidis kurson dum NASK pri la « Historio de Esperanto ». Iun aparte memorindan vesperon, kiam la klaso traktis la « puĉon de Hamburgo » en 1974 (kiam Humphrey Tonkin anstataŭigis Ivo-n Lapenna kiel UEA prezidanto), Duncan invitis Humphrey-on kiel gastparolanton, kaj Humphrey rakontis al ni siajn personajn rememorojn de tiuj eventoj.

Mi opinias, ke la okazintaĵoj de tiu ĉi somero estis aparte avantaĝaj por komencantoj de Esperanto. Mi renkontis

(virtuale, kompreneble) plurajn, kiuj decidis eklerni la Internacian Lingvon nur en marto aŭ aprilo, ĉar ili havis liberan tempon pro la pandemio. Havante la eblecon partopreni tiom multe da virtualaj renkontiĝoj (kaj ankaŭ diversajn





kursojn organizitajn speciale dum la pandemio), ili ofte rapide progresis kaj, post nur kelkaj monatoj, preskaŭ perfekte regis la lingvon. Ili ankaŭ, kio eble estas pli grave, povis senti sin membroj de nia movado. Kiel ekzemplo, vidu la Septembran numeron de la Revuo Esperanto, kies kovrilo reliefigis María-n Luisa-n Soriano González (alinome Marisol) el Hispanio. Ŝi estis unu el la kolibroj, kiun mi plej ofte renkontis dum la diversaj someraj eventoj.

Kompreneble, kolibrado ne estas perfekta. Mi sopiras al ĉeestaj eventoj, al hazardaj konversacioj kun amikoj, malnovaj kaj novaj. Estas certe pli agrable renkonti homojn kaj babili vizaĝ-al-vizaĝe. Mankis al mi la ebleco vojaĝi al nekonataj landoj kaj urboj, por ekkoni la kulturon kaj sperti la unikan etoson. Mi esperegas, ke la UK venontjare ja okazos laŭplane en Belfasto, urbo kiun, kvankam mi estas brito, mi neniam vizitis. Cetere,


sidante dum horoj antaŭ la komputilo, kiel mi faris dum la tuta semajno de la VK, estas lacige kaj solece.

Sed samtempe mi ne povas imagi, ke ni simple reiros al la antaŭpandemia mondo, eĉ post la

malkovro de potenca vakcino, kiu forigus la viruson. La meritoj de virtualaj eventoj estas tro klaraj. Homoj, kiuj ne emas, aŭ ne rajtas, aŭ ne havas la monon por vojaĝi, povas partopreni sammaniere kiel ĉeestaj partoprenantoj.

Por mi persone, mi povas imagi, ke mi



estonte volus ĉeesti unu aŭ du renkontiĝojn ĉiujare, sed ankaŭ partopreni multajn sen eliri la komforton de mia hejmo. Ni devas sendube starigi en la venontaj jaroj multajn hibridajn eventojn, kiujn oni rajtas partopreni aŭ ĉeeste aŭ virtuale. Do, parte kolibro, parte kokino sidanta en komforta nesto, ĉu ?



# Vi maltrafis virtualajn eventojn ?

Ne zorgu, multaj bonegaj prelegoj haveblas rete. Jen la redakciaj rekomendoj !

En la YouTube-kanalo de UEA, [UEAviva](#), troviĝas pluraj bonegaj videoj de la someraj eventoj. Jen la [kompilaĵo de 17 videoj de la VK](#), inkluzive de la solena inaŭguro kaj la tuta mozaiko de programeroj : ekz., kelkaj eroj de la Virtuala Movada Foiro, Internacia Kongresa Universitato (kies rektoro estis kanadano kaj estrarano de KEA Geoffrey Greatrex), prelegoj ligitaj al la kongresa temo : 75-jariĝo de UN, kun la lertega gvidado de Humphrey Tonkin, plus brilaj prelegoj de Margaret Zaleski-Zamenhof kaj Katalin Kováts. Estas ankaŭ kelkaj ekskursoj, inkluzive de la nia : [40-minuta traflugo tra kvartaloj de Montrealo](#), kiun preparis Ĵenja





Amis (eĉ kun subtekstoj !). Ĵenja, cetere, ankaŭ salutis kongresanojn por Ameriko dum la Kontinentaj Salutoj de UEA (kiuj anstataŭis la landajn salutojn por tiu ĉi virtuala evento).

Nepre spektu la [inaŭguron de la VK](#), kiun, cetere, malfermis la video, per kiu Montrealo invitis la kongresanojn al nia urbo por 2020, kun la fama kanto *Haleluja* de Leonard Cohen en traduko de Ĵomart. Montreala parto komenciĝas je ĉ. 30-a minuto de la inaŭguro, per la saluto de Normando Fleury (la prezidanto de la montreala LKK), la urbeŝtrino de Montrealo, Valérie Plante, kaj de Georges Sioui, la mondfame konata indiĝena



historiisto. Unu el la altaj punktoj de la inaŭguro estis la arta prezento de konata kanada kantistino Joëlle Rabu, akompanata de ŝia filo Nico Rhodes.

La plejparto de la videoj de MondaFest' estas ankaŭ tute alireblaj ! [Jen la kompilaĵo de 45 videoj](#) reprezentantaj ĉiujn erojn de la festivalo : prelegoj, arto (aparte rekomendindas la belega kantado de *La Espero* fare de [Amira Chun](#)), tagoj de diversaj kontinentoj — ĉio imagebla ! Montrealo brilis dum MondaFest' per jen plia belega video, kiun lerte preparis fama jutubisto, videografo kaj poligloto Bong Sou [Montrealo motorcikle](#) ! Vi trovos eĉ la videon de la virtuala bankedo — la [Kunmanĝado tra la mondo](#) (prezentiĝis ankaŭ Montreala bagelo !). Notu ke la teamo de la Montreala UK ankaŭ salutis la publikon — vidu la saluton de Montrealanoj je ĉ. 1 horo 20



min. ekde la komenco de la [Somera Inaŭguro](#).

La Virtuala Movada Foiro havis du formatojn : la vivaj prezentoj dum la kongreso kaj la registritaj videoj, kiuj prezentas diversajn E-organizojn kaj asociojn. Spektu ilin [ĉi tie](#) !

2020 estis la jaro, kiu markis la tristan datrevenon de la atombombado de Hiroŝimo kaj Nagasaki. Spektu la kompilaĵon [Ne Plu Hiroŝimo](#), kiu pritraktas tiun eventon (notu ke Hiroŝimo estas ĝemelurbo de Montrealo, kaj ĝi estis aparte menciita en la video *Montrealo Virtuale*).

Laste sed ne balaste, ni menciuj la [bonegan prelegon](#) de Francisko Lorrain, montrealano kaj la kuntradukinto de *Kristnaskaj Rakontoj el Franca Kanado* kaj de *La Eta Princo*, kiu parolis pri la lasta eldono de tiu ĉi bonega libro.

# Virtuala kongreso malfermas novan pordon

*Ĵenja Amis, kun danko al Nicolas Viau*


**Pro la kronviro-pandemio ĉi-jare ne okazas Universala Kongreso. Ĝin anstataŭas unusemajna Virtuala Kongreso de Esperanto, kiu finiĝos sabate. Ĵenja Amis, LKK-sekretario de la prokrastita Montreala UK, partoprenas la unuan Virtualan Kongreson kaj trovas ke ĝi malfermas novan eraon por UEA kaj Esperanto**

Unu el miaj kunlaborantoj, eminenta esperantisto, ofte diras duonŝerce, ke okazis nur unu UK – la unua. Ĉiuj postaj estis ĝiaj ripetoj. Estis iom da vero en tiu diraĵo. Niaj UK-oj sekvas la saman modelon de jardekoj: estas ellaboritaj modelo, komunikmaniero kaj strukturo, kun multaj ŝatataj kaj atendataj programeroj.

Alia flanko de tiu bone funkcia stabilo estas, iumaniere, manko de novaj elementoj aŭ plibonigoj al la kongresa loĝistiko: ekzemple la eblo aliĝi al du kongresoj

samtempe, poŝtelefona apo por sekvi la programon, por vidi la nunajn erojn, programpriskriboj por ĉiuj prelegoj, samtempaj elsendoj kaj filmado de ĉiuj gravaj programeroj, reklamado al pli larĝa publiko, ekzemple en Duolingo, kaj tiel plu.

Mi certas ke tiu certagrada kaptiĝo en la pasinteco radikas ne en manko de volo de la estraro aŭ la CO, sed en la tradicioj (kiuj ja donas tiujn stabilon kaj loĝistikan kadron, sed ankaŭ ja iusence haltigas evoluon), kaj



**Malfermo de la VK. La unua eldono de la virtuala Esperanto-ĥoro kantas la Esperon.**



limigitaj teknikaj rimedoj (ekzemple la retejo de UEA mem, aŭ eĉ la manko de kreditkartmaŝino por la vendoj dum la Libroservo, la iom komplika strukturo de la kongresa mendo-procedo).

Granda parto de tio fontas, kompreneble, el la fakto, ke oni faras jam multon kun tre malgrandaj homaj fortoj, sen helpo de pagita teknika teamo, kiu povus helpi enkonduki teknikajn plibonigojn – eĉ se tiuj plibonigoj povus potenciale ŝpari la tempon de laborantoj, altigi la partoprenantaron, ktp.

**Sed ĉi-jare la aferoj malsamas.** Ni estis elpuŝitaj el niaj komfortzonoj, pretaj aŭ ne, kaj devigitaj repensi niajn modelojn. Mi vere ĝojas ke UEA respondis al tiu defio per la okazigo de MondaFest' kaj la VK, kaj faris tion tute bone!

Jam en marto, kiam fariĝis pli kaj pli evidente, ke la kongreso en Montrealo povos ne okazi, pluraj amikoj demandis min, ĉu okazos virtuala Montreala UK. En la diskutoj kun la estraro de UEA, la LKK rekomendis la prokraston de la Montreala UK je du jaroj, sed ankaŭ apogis la ideon okazigi virtualan eventon. Ne kiel virtualan version de la Montreala kongreso – sed vere kiel apartan virtualan eventon, kun aliaj organizaj teamo kaj identeco. Ni sentis ke estas bezonata tia evento por plenigi la vakuon, kiun kreas la ne-

okazigo de la fizika UK ĉi-jare.

Kiam mi eksciis pri la formulo de tri-monata MondaFest', kadre de kiu okazos unusemajna intensa Virtuala Kongreso (VK), por doni la impreson vere partopreni en tutmonda kongreso, mi tuj pensis ke tiu formato estas perfekta, kaj ĝis nun tre kontentas. Unue, ĝi donas la okazon al diversaj organizoj kaj individuoj kunlabori kaj lerni el la spertoj de la aliaj (ekzemple mi mem komencis la unuan fojon kunlabori kun samideano de centr-amerika lando por organizi la Amerikan Tagon). Kaj due, ĝi ja proponas iusencan anstataŭaĵon por la reala UK, kiu ne okazas ĉi-jare.

Tamen, ne miskomprenu min: mi ne pensas ke virtualaj kongresoj senvalorigos la verajn fizikajn kongresojn – mi pensas ke ili aldonos alian dimension kaj larĝigos la eblon kontaktigi esperantistojn kaj inter si, kaj kun UEA, kaj plie ili povos valorigi la membrecon kaj instigi repensi kaj novigi la strukturojn de la UK-oj ĝenerale.

Mi pensas ke la okazigo de tiuj eventoj estas des pli grava kaj strategia por UEA ĉar vaka spaco neniam malplenas: se UEA ne transprenus okazigi tutmondan Virtualan Kongreson, certe tion farus iu alia – do, por UEA estas bone, ke ĝi la unua okupis tiun ĉi spacon.

**Do jen la Virtuala Kongreso** mem. Ĝi komenciĝis la 1-an de aŭgusto 2020 – en la sama tago, kiam devis malfermiĝi la UK en Montrealo (kvankam MondaFest' daŭras de 20-a de junio ĝis la 20-a de septembro). Same kiel la montreala UK, ĝi finiĝos la 8-an de aŭgusto 2020. La partopreno en VK estas senpaga por membroj de UEA aliĝintaj ĝis la 26-a de julio.

La 31-an de julio okazis "antaŭkongreso", kiu estis tute Kanada: la prezento de la 22 filmoj, per kiuj ni, montrealanoj, provizis la kongresan programon kadre de la Kanada Virtuala Kinejo, plus la prelego pri La Eta Princo (okaze de la 120-jariĝo de la verkinto – la prelegon faris Francisko Lorrain, montrealano, kiu kunordigis la lastan Esperantlingvan eldonon).

La tuta kongreso okazas sur la platformo Retevent de E@I (la sama, kiun oni kreis por Polyglot Gathering rete, kaj poste uzis por IJK, SES kaj VEKI). La VK konsistas el tri specoj de programeroj: speктаĵoj, vidbabilejoj (en la libera programo Jitsi) kaj klasĉambroj (en la programo

Zoom). Speктаĵoj estas la ĉefaj prelegoj, foje antaŭregistritaj, foje samtempe elsendataj per la konferenca retejo Streamyard, kiun navigas la teamo de E@I – la teknika teamo de la projekto.

Oni povas vidi la speктаĵojn aŭ laŭ la horo de la programo, aŭ poste, por ĉiuj ensalutintaj

partoprenantoj. Dum la speктаĵoj oni povas voĉdoni por la plej bonaj demandoj, kaj tiuj estas respondataj de la prelegantoj. Unu tagon antaŭ la komenco de la VK, ĉiuj prelegantoj ricevis individuan sesion kun la teknikistoj de E@I por ricevi la trejnadon kaj teknike pretiĝi. Mi trovis la laboron de la teknika



**Libera babilado kun la montreala LKK, kun proksimume 35 partoprenantoj.**

teamo vere modela!

Vidbabilejoj (en Jitsi) estas aŭ tute liberaj babilĉambroj, sen moderiganto, aŭ temaj babilejoj, kun moderigantoj, aŭ eroj de la Virtuala Movada Foiro: prezentoj de diversaj Esperanto-organizoj, fakaj asocioj, kaj tiel plu, tuj antaŭ aŭ tuj post la programaj horoj (la horoj de la ĉefaj programeroj estas 12.00-18.00 UTC). La kvanto de la liberaj vidbabilejoj iom malgrandiĝis ekde la



komenco, ĉar ofte tiuj estis malplenaj. Tiuj bone funkcias por doni aldonan tempon kun la prelegantoj post la prelego.

**La malfermo ĝenerale bone** kaj ĝustatempe funkciis. Estis multaj kanadaj kontribuoj. Oni legis la saluton de la urbestro de Montrealo, fama kanada indiĝena historiisto, Georges Sioui, parolis pri "spirita Esperanto", la interkompreno inter diversaj indiĝenoj de Ameriko.

Anstataŭ landaj salutoj okazis kontinentaj salutoj, kaj la muzikan paŭzon plenigis la fama kanada kantistino Joëlle Rabu, akompanate de ŝia filo, Nico Rhodes (ambaŭ farus prezenton en la UK en Montrealo). Ili bonege prezentis kaj tute flue parolis. (Nico lernis Esperanton por partopreni la UK-n en Montrealo).

Kompreneble, salutis pluraj estraranoj de UEA, TEJO, ILEI, ktp. Kaj eĉ okazis virtuala prezento de *La Espero* fare de la Internacia Esperanto-Koruso. Malsame de la malfermo de MondaFest', la malfermo de VK ne estis samtempe elsendata per YouTube aŭ Facebook, sed kelkaj eroj de ĝi kaj

prelegoj ja aperas nun en la YouTube-kanalo de UEA ([UEAviva](#)).

La malfermon de la kongreso spektis ĉirkaŭ 260-270 homoj. Mi pensis ke estos eble iom pli da homoj, konsiderante ke pli ol 1 800 homoj aliĝis – sed aliflanke mi ne scias, kiom da homoj spektas la programerojn poste. Inter la prelegoj, kiujn mi spektis, estis de 40 ĝis pli ol 150 samtempaj spektantoj (aŭtoraj duonhoraj malpli – same kiel en la ĉeestaj UK-oj).

En la temaj vidbabilejoj, kiujn mi ĉeestis ĝis nun, estis de 2 ĝis pli ol 50 homoj. Babiladoj kun Duncan Charters, Martin Schäffer, Fernando Maia kaj la Montreala LKK estis inter plej popularaj el tiuj, kiujn mi vidis.

En la babilejoj oni ĝenerale bone sekvis la etiketon – paroli nur kiam la mano estas levita kaj la parolvico estas donita.

La VK pritraktas la saman temon, kiun oni traktas en Montrealo: la 75-jariĝo de UN, kiun reĝisoras eminenta esperantisto, Humphrey Tonkin. Oni planas specialan omaĝon al Hiroŝimo (cetere, ĝemelurbo de Montrealo). Tra la kongreso okazas



**Ĵenja Amis preparis 22 filmojn por Kongresa Kinejo, kun la fama Najbaroj de McLaren, kie aperas Esperanto.**

pli-malpli la kutimaj programeroj: IKU (Internacia Kongresa Universitato), diversaj prelegoj (sufiĉe multaj de kanadanoj), kursoj, aŭtoraj prezentoj, oratora konkurso, aŭkcio, virtualaj ekskursoj tra la mondo (tiuj ricevis multajn pozitivajn komentojn en la babilejoj), “virtuala kunmanĝado” (prezentoj de pladoj el diversaj landoj), komitatkunsido, koncertoj.

**Laŭ miaj observoj**, la homoj vere ĝuas la kongreson kaj plurfoje dankis la estraron de UEA pro ĝia organizo. Tamen, kvankam mi trovas la platformon de VK tute taŭga – aparte se konsideri en kiom mallonga tempo ĝi estis kreita – estas, certe, kelkaj aferoj por plibonigi (bonvolu preni tion ne kiel kritikon, sed simple konsideraĵon por la venontaj eldonoj).

Tio, kio vere mankas, laŭ mi, estas persona mesaĝilo inter la partoprenantoj, eblo ŝati ies komenton aŭ respondi al ĝi, havi temajn mesaĝfadenojn aŭ marki iujn partoprenantojn en la mesaĝoj. Ankaŭ ne eblas redakti siajn proprajn afiŝojn, se oni rimarkis eraron. La afiŝado de programeroj povus esti iom plibonigita (ekzemple

montri erojn ekde nun, aŭ laŭ specifaj horoj, aŭ ne montri noktajn programerojn).

Estus bele ankaŭ povi krei “Mian programon” (t.e., marki nur specifan tempon ne devante trairi ĉiujn 10+ paĝojn de la programeroj por unu tago). Estus ankaŭ bele havi statistikojn pri partoprenantoj aŭ afiŝi aliĝintojn laŭlande.

Pri la videaj partoj, mi trovis ke la laŭteco foje

estis ne sufiĉa, aparte se la registrado de la programeroj okazis ne ĉe la plena kapablo de la mikrofono. Iom ĝena estas ke oni devas refreŝigi la retumilon por vidi la elsendon, se oni alvenis al la programero pli frue (la teknika teamo tamen ĉiam rememorigis tion al homoj en

komentoj). Mi diru, ke la teknika teamo vere fulmrapide reagis al ĉiuj demandoj kaj “panikoj” de la prelegantoj (okazis al mi).

**Ĝis nun, merkredon vespere** Montreal-tempe, ne okazis ajnaj grandaj fuŝoj, atakoj aŭ miskondutoj en la Jitsi aŭ Zoom-ĉambroj – kompreneble, kiel en ĉiu virtuala evento, foje okazis eraretoj (ekzemple malĝusta sondosiero aŭ manko de subtekstoj) – sed ĉio tio estis tuj rimarkata kaj



**La Akademio respondas.**



korektata de la teknikistoj aŭ gvidantoj de la programeroj.

La sola afero, kiun mi trovis vere ĝena, estas ke unufoje mi devis atendi iom longe por eniri en la klasĉambrojn de Zoom. Al unu amiko okazis, ke li entute ne estis enlasita, ĉar li alvenis malfrue – do, estontece mi eble rekomendus havi kunmoderigantojn por ĉiuj klasĉambroj, kiuj postulas aprobon de partoprenantoj, tiel ke unu persono povu gvidi dum la alia povas prizorgi la enlason de partoprenantoj.

Por resumi – mi pensas ke la iniciato de MondaFest' kaj la organizo de VK de UEA estis bonega kaj strategia iniciato, kaj mi aplaŭdas la estraron, la teknikan teamon kaj ĉiujn kunlaborantojn, kiuj sukcesis kunmeti grandan sukcesan eventon ene de tiom mallonga tempo. Gratulojn – estis grandega laboro kaj eble eĉ pli granda lernado!

**Certe virtualaj kongresoj neniam** anstataŭos la ĉeestajn kongresojn, sed mi pensas, ke la nunaj kongresoj ne plu povas ne havi ian virtualan elementon. Mi ankaŭ esperegas ke la virtualaj kongresoj estos ankaŭ maniero de UEA juniĝi teknologie, trovi novajn fortojn kaj novajn talentojn en Esperantujo, konektiĝi al la Duolingo -publiko: fonto de potencialaj novaj membroj,

repensi kaj novigi la kongresojn ĝenerale kaj iom post iom pensi pri la rolo de UEA, la estraro kaj la oficejo en la post-kovima, eĉ pli konektita mondo.

La apero – kaj uzado – de Retevent, produkto de E@I, do de Esperantujo, unue uzita ekster Esperantujo (Polyglot Gathering), povas helpi altigi la prestiĝon de niaj lingvo kaj komunumo, kaj valorigas la laboron de esperantistoj. Verŝajne ĝi jam helpis ŝanĝi kiel multaj homoj rigardas UEA-n, kiu nun ne plu estas nur la plej malnova tradicia movada organizo, sed moderna organizo, kiu sukcesis rapide elturniĝi kaj havigi novan valoron al siaj membroj dum krizo.

Ĉio ĉi ankaŭ montras, ke UEA ne estas sola. Ĝi povas uzi la sufiĉe grandajn fortojn kaj spertojn de Esperantujo preter UEA mem. Esperantujo estas bunta kaj sperta kaj kapablas fari tion, kion oni antaŭe taksis nebla. Ne sufiĉas simple kritiki UEA-n aŭ aliajn organizojn. La atendoj por la estonteco estos altaj, sed helpante unu la aliajn, lernante unu de la alia kaj dividante la spertojn, nia agado sukcesos! Ĉu la – eble al kelkaj surpriza – travivado de nia lingvo dum 133 jaroj ne pruvas tion?

*Unue aperis en Libera Folio, en aŭgusto 2020*

# La Tago de Ameriko

*Bob Williamson, kun helpo de Luis Obando*

Ĉu vi jam konas Amerikon ? Kiel bone ? La 30-an de aŭgusto okazis la Tago de Ameriko, la lasta kaj plej longdaŭra el la kvin regionaj tagoj de MondaFest' 2020. Post la pli ol sep-hora programaro, ĉiuj ĉeestintoj de la tago multe pli bone sciis pri la diversaj partoj de la tuta Ameriko, de la norda poluso en Kanado ĝis la suda pinto de Ĉilio.

Kvar-kapa grupo antaŭplanadis kaj realigis la tutan tagon : Rafael Despradel de Dominika Respubliko

(prezidanto de la organizteamo), Fernando Maia Jr. de Brazilo (Vic-prezidanto de UEA), Ĵenja Amis de Kanado (LKK-ano en Montrealo) kaj Luis Obando de Kolombio (ĵus-eksa estrarano de TEJO), la lerta magiisto de la teĥnikaj aferoj.

Krome estis aliaj homoj, kiuj multe helpis pri diversaj eroj.

Kiel klarigis Luis, unu el la defioj pri la planoj okazis pro damaĝoj kaŭzitaj de la antaŭnelonga uragano Laŭra, kiu eĉ mortigis homojn en diversaj

karibaj landoj. Lastmomente, Rafael informis la teamon, ke la konekto eble subite ne povos

funkcii, kaj tio ja okazis je la fino. La tagon de la evento aperis propono, ke Luis kunprezentu la eventon (ĉar la antaŭa plano estis, ke li nur prizorgu teĥnikaĵojn, kaj nek ŝaltu kameraon nek uzu mikrofonon).

Bonŝance, Rafael kaj Luis kunkune faris la

prezenton, tute ne planitan, kaj multaj homoj ŝatis la stilon de la evento. Ili ricevis plurajn mesaĝojn de homoj, kiuj gratulis ilin pro tio, ke ili prezentis ĉiun eron tiel sprite, gaje kaj kelkajn eĉ ŝerce.



Pro tio, ke Rafael eble perdus sian retkonekton, oni decidis, ke Luis estu la ĉefa gastiganto de la ĉambro en Zoom. Samtempe li dissendis la programon per Jutubo kaj ludis/sendis la videojn, kaj prezentis ĉion kaj respondis al prelegantoj, kiuj senĉese demandis lastminute, ktp. Li ja ĝojis, ke la retkonekto sufiĉe bone funkcias, kaj ke li havas du ekranojn en sia komputilo, kaj kelkajn aliajn aparatojn, per kiuj li povas kontroli, ĉu ĉio iras glate per Jutubo, Zoom, retpoŝto, babilejo kun prelegantoj, ktp.

Magiisto.

La programaro estis abunda, varia kaj riĉenhava pro tio, ke Ameriko ja estas sufiĉe granda kaj ĉiuj volis esprimi sin. Ĉu vi scias, kiom da suverenaj landoj troviĝas en (Norda, Suda, Centra kaj Kariba) Ameriko? Estas tridek kvin (kun multaj kromaj teritorioj). Ĉu pli granda aŭ malpli granda nombro ol en Eŭropo? Estas malpli, ĉar Eŭropo havas kvindek suverenajn landojn. Ĉu Ameriko havas pli grandan aŭ malpli grandan loĝantaron ol Eŭropo? Efektive, pli grandan, kun iom malpli ol



miliardo da loĝantoj.

La Tago de Ameriko komenciĝis per salutvortoj nome de TEJO, la Amerika Komisiono kaj UEA kun mesaĝo de la nuna honora prezidanto de UEA, Humphrey Tonkin. Tonkin reliefigis la miraklan transformiĝon en la agadmanieroj de esperantistoj, kiuj ne nur respondis al, sed eĉ superis, la defiojn de la ĉi-jara pandemio. Post la inspiraj vortoj de Tonkin, diversaj Landaj Asocioj kaj Sekcioj de UEA/TEJO prezentis sin. Ni aŭskultis

raportojn el Peruo, Argentino, Brazilo, Ĉilio, Haitio, Kanado kaj Kebekio, Kolombio, Meksiko, Venezuelo, Paragvajo kaj Dominika Respubliko. Parenteze, ĉu vi scias kiuj du Amerikaj landoj havas du 'oficialajn' lingvojn?

Temas pri Kanado (angla kaj franca) kaj Paragvajo (hispana kaj gvarania, indiĝena lingvo). Oni bedaŭrinde ne povis aŭdi de Kubo, Urugvajo kaj Usono. Por fini ĉi tiun parton, distris nin belaj kantoj far Tim Gallego, Kolombiano loĝanta en Berlino. Trovu lian albumeton 'Vaganto' ĉe [mallonge.net/6j](https://mallonge.net/6j).



Post la bela muzika interludo de Tim, sekvis serio da prelegoj diverstemaj. Franklin Montenegro klarigis pri kaj citis el fama libro el Peruo, kiun li mem tradukis: Interpretaj Esoj pri la perua realo de José Carlos Mariátegui. Mi mem paroletis kun Franklin dum la ĉi-jara NASK; li estas emerita kuracisto, kaj li donis al mi gravan informon pri tio, ke kormalsano vere estas malsano de la sangosistemo. Ho, mia kor'! Kiel diabetulo, gravas al mi konscii pri tio.

Gravas ankaŭ la konscio pri la pensado de Mariátegui.


Sekvis el okcidenta Kanado Wally du Temple, kiu prelegis pri la eldonota Kanada Antologio de kanadaj verkoj tradukitaj en Esperanton. Sekvis lin kebekiano, Francisko Lorrain, kiu detale priskribis la malnovan verkon *Kristnaskaj Rakontoj* de Louis Fréchette kaj tentis nin per citaĵo el la libro, kune kun detala priskribo pri la laborego, por plibonigi la tradukaĵon. Alia kebekiano, Zdravka Metz, prelegis pri la vizito en la 1910-a al Nord-Ameriko de Ludoviko Zamenhof.

Se paroli pri la familio Zamenhof, amike salutis nin nome de tiu familio Margaret Zaleski-Zamenhof, kiu ankaŭ portis belan kolĉenon, evidente faritan de ŝia amikino kaj instruistino, Katalin Kováts. Por fini ĉi tiun parton, distris nin video de la bela kanto Indiĝena Romanco de multvoĉa duopa ĥoro : Jahir Cataño kaj Luis Obando (jes! ĉi tiu Luis).

La postan prelegon pri 'Instruado de Esperanto kaj Ameriko :

Edukado.net, ILEI, Poznano' donis Katalin Kováts. Kiel ŝi diris, temis pri « la vero de Ameriko, rigardata de ekstero. » Fakulo pri la temaro, Katalin klare montris, ke mankas sufiĉe da instruado de Esperanto en Ameriko, kaj ŝi faris gravajn rekomendojn kaj

donis gravajn informojn. Ekzemple, la lasta sesio de la Poznana kursaro pri Esperantologio komenciĝos venontjare. Katalin forte instigis Landajn Asociojn serĉi kaj helpi tiujn homojn, kiuj kapablos ĉeesti tiun kursaron por poste helpigi la movadon kaj ĉefe la instruadon de Esperanto en



siaj propraj landoj.

Sekvis muzika interludo el Meksiko fare de Edgar Gallego, kiu kantis la arion Ninja, tradukitan el la itala Ninna. Prelegis Ĵenja Amis pri sia urbo « Montrealo Virtuale » kaj denove kantis Tim Gallego kun sia belsona gitaro. Ĵenja revenis por doni amuzan kvizon « Ĉu vi konas Amerikon? » Ĝis tiam ne ĉiuj povis ĝuste respondi al ĉiuj demandoj. Ekzemple, kiom da Universalaj Kongresoj jam okazis en Ameriko ? Kiel plej ĝuste respondis Rafael : naŭ kaj duono.

La tago ankoraŭ ne finiĝis. Sekvis novaj prelego kaj magia spektaklo : Pentrado de Luis Vargas Santa Cruz, artisto el Meksiko (Diana Alondra) ; Spertoj de instruistoj dum Kurso de Esperanto por hispanparolantoj (David Rueda) ; Statistikoj de la Kurso de Esperanto por hispanparolantoj (Doniben Jiménez) ; Amuza parolado kun surprizaj ĵonglaĵoj antaŭ la kamerao (Liin Ilusionista) ; ...kiel li faris tion ? Estontecaj pripensoj de la lingva instruado en Ameriko

(Carlos Velazquillo) ; Kolombia Kulturtrezorejo (Rodrigo Ramírez) plus kanto La Vojo de l' Vivo, verkita kaj kantata de Héctor Ochoa-Cardañas, ambaŭ el Kolombio ; Rimedo por internacia solidareco... al georfoj en Goma, DRK (Betti Maul, denaskulino fame konata kiel unu el la unuaj retkolibro, kaj 'la plejbona panjo de la mondo').



Post iom pli ol 7 sinsekvaj horoj, finiĝis la Tago de Ameriko per « Ĝisojn el Ameriko ! » kun kortuŝaj fermaj vortoj de Fernando Maia Jr. pri solidareco kaj amo, kaj 20-minuta muzika koncerto de la fama brazilano Manno Montana, kiu prezentis kanzonojn

amerikajn de l' sudo ĝis nordo, de Argentino, Brazilo kaj Kanado. Haleluja! Realtempe ĉeestis la tagon proksimume 240 homoj el la tuta mondo, kaj poste spektis jam multe pli ol mil. Ankaŭ vi povas (re)spekti ĝin en la kanalo de UEA viva ĉe <https://mallonge.net/6e>.

*Unue aperis en la revuo Esperanto (oktobro 2020)*

# Kvazaŭ-ZEO\* super la Niagaro

## *José Antonio del Barrio, Hispana Esperanto-Federacio*

Partoprenantoj de la kongresa ekskurso al la Niagaraj Akvofaloj, aŭ simple ajna vizitanto de tiu turisma atrakciaĵo, povos vidi kaj eĉ vojaĝi per objekto kun interesa rilato al Esperanto : la tiel nomata *Spanish Aero Car* aŭ *Whirlpool Aero Car*, eble la plej longe funkcia artefarita vidindaĵo de tiu areo.

Post la famaj akvofaloj, la akvo ne perdas sian forton, kaj la rivero daŭrigas sian vojon kun granda rapideco, ĝis ĝi atingas lokon, kie la vojo subite kurbiĝas. En tiu punkto kreiĝas grandega vortico (akvokirliĝo), kiu montras impresan spektaklon. Do, kiam vi vizitos la Niagarajn Akvofalojn, ĝuu la spektaklon, sed ne restu nur apud la faloj mem. Sekvu iom la riveron, ĉu per bela promenado ĉe la Niagara Gorĝo, aŭ per oftaj aŭtobusoj, kaj alvenu al la Vortico (angle *Whirlpool*). Tie, por eĉ pli bele ĝui la spektaklon, vi trovos antikvaspektan

kabloveturilon, ruĝkoloran, kiu trairas la tutan kirliĝon je alteco de averaĝe 70 metroj, dum longeco de 580 metroj.

La veturilo aspektas antikve, ĉar ĝi ja estas tia : ĝi estis muntita antaŭ pli ol jarcento, en 1916, kaj funkcias de tiam, tute sekure, nur kun kelkaj aktualigoj kaj riparoj.

Ĝi nomiĝas *Spanish Aero Car*, ĉar ĝi estis konstruita de hispana inĝeniero kaj inventisto, kiu ankaŭ estis esperantisto... eĉ « feroce » esperantisto ! Lia nomo estis Leonardo Torres Quevedo (elparolu *Tores Kebedo*, kaj atentu, ke, laŭ la hispana kutimo, Torres kaj Quevedo estas respektive la paĉja kaj panja familinomoj, kaj ke li ĉiam uzis ilin ambaŭ kune).



EL EMINENTE BARRIO ESPAÑOL  
D. LEONARDO TORRES QUEVEDO  
Fot. Franzen.

Por multaj el vi lia nomo probable ne estas tre konata, sed li ja ricevis grandan rekonon en sia tempo, kaj meritas pli bonan memorigon. Li estas certe la plej elstara inĝeniero de la komenco de la

\* ZEO: Zamenhof/Esperanto-objekto, objekto omaĝe de Ludwik Lejzer Zamenhof aŭ Esperanto (Vikipedio)



20-a jarcento en Hispanio, kiu eble ne tiom brilis internacie, ĉar la lando estis tiam relative postrestinta kompare al aliaj eŭropaj landoj de la epoko, sed kiu faris gravajn kontribuojn al la scienco kaj teknika disvolvo.

Torres-Quevedo komencis sian karieron konstruante ĝuste telferojn (pendajn transportilojn), el

kiuj tiu en Niagaro estas la kulmino. Li poste komencis dezajni direkteblajn flugbalonojn. Oni ne devas uzi la nomon *zepelino* en tiu ĉi kazo, ĉar liaj balonoj utiligis duonrigidan strukturon, kiu havis plurajn avantaĝojn, sed kiu estis malpli sukcesa ol tiu de grafo Von Zeppelin.

Li konstruis la unuan teleregilon, kapablan movi pecojn je distanco per radiaj ondoj. En sia plej fama provo, li movis malgrandan boaton je distanco en la haveno de Bilbao, kun ĉeesto de la tiama hispana reĝo. Tio okazis en 1906, tri jarojn antaŭ la UK en Barcelono, kaj oni scias, ke en la oficiala festo post la demonstro, li parolis publike



favore al Esperanto, kiun li ĵus estis koninta.

Li utiligis sian mastrumon de elektromekanikaj iloj poste por konstrui aliajn maŝinojn, inter kiuj iujn el la unuaj kalkuliloj utiligantaj tiun principon. Ili bone funkciis por fari komplikajn kalkulojn, kiel solvi ekvaciojn.

Sed, en tiu kampo, lia plej fama invento estis la

unua maŝino aŭtomate ludanta ŝakon, nomata « El Ajedrecista » (*la ŝakludisto*). Ĝi estis tre simpla, ludanta la finalon de reĝo plus turo kontraŭ reĝo, sed ĝi kapablis ĉiam ŝakmati, bele ludante

kontraŭ homo, sen eraroj. Tiu maŝino kaj kelkaj aliaj, plus modeloj de aliaj liaj laboroj, konserviĝas en modesta muzeo en la madrida politeknika universitato, kiun antaŭnelonge la membroj de la loka Esperanto-grupo vizitis kune.

Li disvolvis kaj patentis multnombrajn aliajn inventaĵojn. Li ricevis multajn hispanajn kaj internaciajn omaĝojn kaj rekonon.

En la dudekaj jaroj li estis nomumita membro de la Komisiono pri Intelekta Kunlaboro de la Ligo de

Nacioj, ofte konsiderata kiel la antaŭanto de la nuna UNESKO, formita el gravaj homoj de la literaturo, filozofio aŭ scienco, kiel Albert Einstein, Marie Curie, Gilbert Murray aŭ la franca filozofo Henri Bergson, kiu estis ĝia unua prezidanto. Kiam la Ligo de Nacioj rifuzis la konsideron de ebla rolo de Esperanto en tiu institucio, la propono estis alveninta al tiu Komisiono. Estis ĝuste Torres-Quevedo, kiu sugestis, ke la Komisiono studu la rolon de arta helplingvo por faciligi la sciencajn rilatojn inter la popoloj.

La propono ricevis la favoran konsideron de pli ol la duono de la membroj de la Komisiono, sed estis forte kontraŭbatalata de la prezidanto Bergson, kiu, kvankam mem favora al Esperanto, ricevis klaran kriterion tiucelan de la franca diplomataro. Tiu ĉi konsideris speciale grava la favoradon de la influo de la franca kulturo, kaj vidis la komitaton kiel preferatan ilon en la defendo de tiu rolo, kaj ne povis riski la adopton de Esperanto en ajna signifa rolo. Mi havis okazon legi paperojn de tiu diplomatia interŝanĝo, kaj evidentiĝas la danĝero, kiun la diplomatoj kaj politikistoj en Francio vidis en tiuj iniciatoj.

Eble vekiĝis via atento, kiam mi en la komenco skribis, ke Leonardo Torres Quevedo estis « feroča esperantisto ». Tiu adjektivo ne estas mia, sed de

la franca ambasadoro en Berno, kiu, raportante la debatojn kaj menciinte la rolon de la hispania sciencisto dum ili, asertis, ke li estas « farouchement espérantiste ».

Malgraŭ tiu fiasko, tamen Torres Quevedo plu apogis nian lingvon en diversaj okazoj. Li partoprenis ekzemple en la Konferenco pri la Utiligo de Esperanto en la Puraj kaj Aplikitaj Sciencoj, kiu kunvenigis pli ol 200 sciencistojn en majo 1925 en Parizo. Li ankaŭ membris en la Honora Komitato de la Hispana Esperanto-Asocio kaj defendis la lingvon en aliaj forumoj, ĝis sia morto en 1936.

Do, kiam vi vizitos la Niagarajn Akvofalojn, ne forgesu gliti super la rivero en bela historia veturilo, kun speciala signifo por ni, ĉar esperantisto kreis ĝin. Kaj ankaŭ ĉar ĝi reprezentas belan metaforon, pro tre kurioza cirkonstanco : la du ekstretoj de la vojaĝo troviĝas en kanada tereno, sed ĝi trairas pecon de usona teritorio, do dum la vojaĝo ire-revene vi trapasas oficialan internacian bordon kvarfoje. Ĝi estas la sola loko, kie vi suferos neniun kontrolon por trairi la kanadan-usonon landlimon. Ĉu ne bele, ke danke al esperantisto ankaŭ ĉi-kaze landlimoj havas nenian gravecon ?

*(bildoj el Vikipedio)*

# Eduardo Vivancos centjariĝis !

**Eduardo Vivancos — unu el la plej elstaraj Esperantistoj, kiu batalis en la hispana civila milito en la 30-aj jaroj kaj kiu loĝas en Toronto ekde la 50-aj jaroj, fariĝis centjara en septembro 2020. Javier (Xavi) Alcalde, el Barcelono, vizitis Kanadon en 2017 speciale por intervjui Eduardon por la baldaŭ aperota biografia libro, kiun li pretigas. En tiu ĉi numero Xavi rakontas pli pri tiu mirinda persono kaj lia eksterordinara vivo.**

## *Javier Alcalde*

### **Idealisto kaj atleto**

Eduardo Vivancos naskiĝis en 1920 ene de humila familio alveninta Barcelonon el suda Hispanio, kun tamen sociaj kaj kulturaj interesoj. Li partoprenis la proletan movadon dum floranta periodo por progresemaĵoj : la tielnomata dua hispana respubliko (1931–1936). Komencinte sian laboristan vivon tri monatojn antaŭ lia dekkvarjara naskiĝtago, li aliĝis al CNT [Confederación Nacional del Trabajo — Nacia Konfederacio de la Laboro], tiam la ĉefa anarkiista sindikato en Eŭropo. Dume, li studis en vespera laborlernejo. Li ankaŭ eklernis la racian lingvon Esperanto, kiun li komprenis kiel esencan

elementon de nova mondo konstruota, kaj ekagadis prie : li korespondis kun eksterlandanoj, varbis kamaradojn, verkis artikolojn, ĉeestis publikajn eventojn, organizis kursojn, ktp.

Aldone, li sukcese praktikis atletismon. Li eĉ kurintus la 5000-metran distancon en la Popola Olimpiado de Barcelono en 1936 ! Proteste kontraŭ la samjaraj olimpikaj ludoj okazontaj en la nazia Berlino, temis pri amase partoprenuta multsporta kaj kultura evento, fine ne estiĝinta pro la milita puĉo de generaloj Mola kaj Franco. Lastatempe iuj ĵurnalistoj kaj esploristoj interesataj en tiu popola olimpiado kontaktis Eduardon por scii pli pri ĝi, ĉar ne plu vivas multaj



el ĝiaj ĉefroluloj. Pro malfacilaj historiaj kaj personaj travivaĵoj, li ĉesos kuri dum jardekoj. Eventuale en la 1960-aj jaroj li denove iĝos atleto, kaj en urbaj maratonoj (interalie en Bostono), kaj en mondaj konkursoj por veteranoj kiel ano de la kanada nacia teamo.

## Milito kaj koncentrejoj

Ankoraŭ adoleskanto, li aktivis en la tiutempa socia revolucio, kaj volontulis por batali en la hispana milito (1936–39). Li fariĝis kultura komisaro de sia roto, instruante legi kaj skribi al analfabetaj kamaradoj. Krome, en la tranĉeoj li lernigis la internacian lingvon al junaj soldatoj, kaj informiĝis pri la milito pere de *Informa Bulteno* de CNT-AIT, esperanta liberecana publikigaĵo. [AIT = Asociación Internacional de los Trabajadores — Internacia Asocio de la Laboristoj] Tiam li verkis taglibron, unue hispane kaj poste en Esperanto, kies unuan parton eldonis en oktobro 2018 la revuo *Beletra Almanako*, esperantigitan de lia fratino



Juliette Ternant (nask. 1929). Bedaŭrinde, la dua parto verkita en la internacia lingvo perdiĝis je la fino de la milito, dum la retiriĝo Francien de la respublikana armeo.

Kun centmiloj da aliaj samnacionoj (inkluzive de sia patro), li ekziliĝis en 1939 dum malvarma vintro piede tra la Pirinea montaro. Ses longajn jarojn li pasigis en pluraj koncentrejoj en Francio kaj ankaŭ en laborkompanioj en Germanio. Inter

liaj samsortanoj estis ne malmultaj samideanoj, kiel la barcelonano Jaume Grau Casas, vicprezidinto de la Akademio kaj aŭtoro interalie de la lernolibro, per kiu Eduardo eklernis Esperanton, kaj de la kortuŝa *Tagoj kaj ruinoj* (SATEH, 2017). Ankaŭ Eduardo tiam regule verkis, sed preskaŭ ĉio denove perdiĝis. Bonŝance pri kelkaj el siaj aventuroj li skribis multajn jarojn poste, kiel pri tiu tago, kiam, plifortigante tranĉeojn por defendi Parizon de la alveno de la nazioj, oni konfuzis lin kun germana paraŝutisto...

## Parizo

Post la dua mondmilito Eduardo loĝis en la franca ĉefurbo. Tie li konatiĝis kun Ramona, tie naskiĝis Floreal kaj Talia, kaj tien alvenis per simila montara odiseado liaj patrino kaj fratino. Tiu lasta entuziasmiĝis pri Esperanto kaj ankoraŭ hodiaŭ aktivas, ĉefe en SAT-rondoj. De tiam ambaŭ gefratoj komunikiĝas per la internacia lingvo.

Eventuale ankaŭ la gepatroj esperantistiĝos, sed tio okazos poste, jam en Kanado.

Eduardo aliĝis al SAT en 1945 kaj ĉiam restos fidela SAT-ano. En epoko, kiam ne oftis membriĝi en ambaŭ organizaĵoj, lia liberecana sinteno ne direktis lin al UEA. Tamen, li ne estis dogmema tiurilate kaj principe konsideris ĉiun esperantiston kiel amikon. En 1950 li partoprenis la parizan UK-on kiel helpanto de la LKK.

En Parizo li redaktoris *Senŝtatano*, la bultenon de la internacia asocio de junaj anarkiistoj, verkitan tute en Esperanto. Ĉar ne ekzistis diplomaciaj rilatoj inter Hispanio kaj Francio, tiu publikigaĵo peris korespondadon inter la hispanaj ekzilitoj kaj iliaj familioj. Aldone, ĝi plifortigis la rilatojn inter eŭropaj kaj aziaj liberecanoj. Danke al ili Eduardo



hispanigos la ĉefan verkon de Lao Tse, pere de punta esperanta versio de Taiji Yamaga. En 1993, okaze de veterana monda konkurso pri atletismo, Eduardo vizitis la familion de Yamaga en Japanio. Tiam li ankaŭ vizitis Ĉinion kaj detale raportis pri tiuj vojaĝoj en la revuo *Flama* [Flamo] de la toronta centro pri la kataluna landaro, kun kiu li kunlaboris dum pli ol jardeko.

## Toronto

Kiam evidentiĝis, ke la faŝisma reĝimo en Hispanio daŭros, Eduardo kaj lia familio decidis translokiĝi al lando kun pli bonaj ŝancoj por enmigrintoj : Kanado. Estis la jaro 1954. En Toronto li rapide eniris en la lokan esperantan movadon, kiu helpis lin orientiĝi en tiu nova etapo. Li fariĝis ties motoro dum jardekoj, instruante la lingvon al pluraj generacioj de samideanoj, kaj efike organizante publikajn eventojn. En 1973, la unuan SAT-kongreson ekster Eŭropo. En 1987, ampleksan ekpozicion en la urba biblioteko. Samjare li ankaŭ prizorgis la eldonon de multlingva propaganda filmo pri Esperanto. El la pli ol dudeko da lingvoj, li registris ĝin katalune kaj hispane. Ankaŭ la (ĉefan) version en la internacia lingvo li mem faris.



En Toronto li kunfondis atletisman klubon por veteranoj kaj engaĝiĝis en ĝia (sporta kaj socia) agado. Lia tiama laboro en poŝt-oficejo permesis al li efektivi longan revon : lerni universitate pri hispana literaturo. Kiom fieraj estis liaj gepatroj, kiam li sinsekve finis licencon kaj magistriĝon ! Li povintus instrui en la universitato, sed preferis resti en sia laborejo. Koncerne la tiean hispandevenan komunumon, kun ĝi li nature rilatis solidare. Jen anekdoto prie : kiam boksisto suferis seriozan vundon post bokso-matĉo, tiel ke li ne plu povis okupiĝi pri sia familio, Eduardo proponis akcepti kaj loĝigi siahejme unu el liaj filoj. Kaj tiel li faris, ĝis la familio de la boksisto decidis reveni Hispanien.

Dume, li korespondis kun ekzilitoj plurlande,

verkis pri Esperanto en liberecanaj publikigaĵoj, kaj kunlaboris kun la helpa agado de *Solidareco Internacia Kontraŭfaŝisma* (SIA). Krome, li regule aktivis en *Canadian-Spanish Association for Democracy*. En tiu kadro li organizis viziton al Toronto de elstaraj figuroj, kiuj luktis kontraŭ la diktaturo. Interalie, Federica Montseny, ano de la registaro en la 1930-aj jaroj ; kaj Enrique Tierno Galván, estonta urbestro de Madrido en la nova hispana demokratio. Kaj li publike kontraŭis la okazigon de la madrida UK en 1968. Tiun polemikan eventon solene malfermis frato de registarano, la diktatoro mem rolis kiel alta protektanto, kaj tiuj okazaĵoj ankoraŭ hodiaŭ gravas en diskutoj pri neŭtraleco en la kadro de UEA.

## **Diskoniginda historio**

Eduardo estas unu el tiuj sindonemaj homoj, kiuj dediĉis sian tutan vivon al Esperanto. Kial gravas diskonigi lian vivon ? Unue, ĉar ĝi formas parton de nia kolektiva historio. Ni devus lerni kaj instrui ĝin, por montri, ke Esperanto ja estas ne nur lingvo. Aldone, temas pri unu el tiuj preskaŭ anonimaj homoj, kiuj sukcesis uzi (kaj utiligi) la internacian lingvon trans la Esperanto-movado. Kaj, eble pli grave, li estas unu el tiuj esperantistoj, kiujn oni povus taksi (ideologie)



zamenhofaj. Alivorte, li praktikis la homaranajn valorojn en sia ĉiutaga vivo. En la zorgiga nuntempo, kiam ŝajnas, ke ekstremdekstruloj akiras pli da povo preskaŭ ĉie en la mondo, diskonigi tian agadon povas esti inspira por novaj generacioj de esperantistoj.

Hodiaŭ Eduardo preskaŭ blindas. Kvankam lia menso ankoraŭ viglas, fizike lia aĝo ĉiam pli sentiĝas. Tamen, li daŭre propagandas Esperanton laŭ siaj ebloj, kiel mi mem observis, kiam mi vizitis lin en majo 2017. La flegistinoj de la restadejo



difinis lin bonkora kaj bonhumora idealisto, esencaj trajtoj de modela esperantisto, kiel agnoskite interalie de UEA. Tial, en la seula UK en 2017 li ricevis diplomon pri elstara agado. Nun li aparte kontentas pro tio, ke la ĉijara SAT-kongreso okazas en sia amata naskiĝurbo, kaj ŝatas esti informata tiurilate. Kompreneble, li ankaŭ scias pri la venonta UK en Montrealo, kaj antaŭĝuas ĝin. Se iu leganto emas viziti lin aŭ telefoni al li, bonvolu kontakti la redaktoron de *La Riverego*.

**La 19-an de septembro — la tago, kiam Eduardo Vivancos 100-jariĝis, Xavi Alcalde faris prelegon**

**pri tiu ĉi unika persono. La prelego spekteblas senpage en YouTube : [youtu.be/1JCV9L83 UI](https://youtu.be/1JCV9L83 UI)**



# Ĉu Mia Lando ?

*Bob Williamson*

En la jaro 1964, fama kebekia kantisto, Gilles Vigneault, verkis franclingvan kanton por dokumenta filmo reĝisorita de Arthur Lamothe, kaj la kanto fariĝis fama tra la lando. « Mon Pays » (Mia Lando) priskribas la vintran hejmlandon de la aŭtoro : « Mia lando ne estas lando, ĝi estas vintro. » En ĝi la kantisto esprimas sian deziron fideli je siaj samlandanoj kaj inviti samteranojn loĝi apude : « Mia domo estas via domo [...] Mi preparadas la kamenon kaj spacon / Por la homoj el la horizonto / Kaj la homoj estas el mia raso. » Ĝi estas kanto muzike belega, se iom komplika, kun diverseco da melodiaj kaj ideaj temoj.

Kiel anglalingvano, mi serĉis anglalingvan tradukon de la kanto por prezenti dum vintra halifaksa folkloro vespero, kaj mi ektrovis mencion de muzika disko el 1970 kun kanto « My Country » (Mia Lando), kantita de Judy Lander.



Retmesaĝe mi petis helpon ĉe [JudithLander.com](http://JudithLander.com) kaj Judith, kiu nun instruas kantadon en Oakville, Ontario, bonkore sendigis al mi sondosieron de la kanto. Mi eklernis kaj (iom malbone) prezentis ĝin. La traduko, kvankam nur la unua duono de la originala kanto, estis bonege plenumita de ŝi kaj kunlaboranto Sam Ouellet. Tradukado de poezia verko estas aparte malfacila, kiel ni ĉiuj scias. Tradukilo povas doni la signifojn de la vortoj, sed por kanto oni devas preskaŭ rekrei novan verkon, kiu sufiĉe trafe spegulas kaj la signifon kaj la ritmon de la originalo en aliaj (alilingvaj) vortoj. Tion Lander bonege faris, laŭ mia opinio.

Kiel esperantisto, la ideo de naciismo iom maltrankviligas min. Tamen, eĉ se Vigneault ne volis priskribi la tutan landon de Kanado, sed nur la nacion de Kebekio, multaj kanadanoj kiel mi tiutempe multe ŝatis la kanton kaj kredis, ke ĝi lerte spegulas la tutan landon, aparte dum vintro.

Bedaŭrinde, mi malbone scipovas la francan, kaj pro tio mi ne tute komprenas, kial oni kvazaŭ adoptis la kanton kiel nacian himnon de Kebekio. Al denaskaj franclingvaj kebekianoj mi petas klarigon pri la nuancoj de la kanto.

Fina demando : Ĉu mi rajtas prezenti ĝin, en kiu ajn lingvo, kiel kanadan kanton ?

**De la redakcio :** Responde al la demando de Bob Williamson, la sekretario de KEA kaj de ekde oktobro 2020, nova LKK-ano de la LKK por Montrealo-2022, ni proparolis ekzakte tiun ĉi demandon, kaj decidis ke tiu kanto perfekte reprezentas Kebekion kaj Kanadon. Fakte, ni volas, ke ĝi estu unu el niaj artaj projektoj por prezenti al la publiko dum la UK-2022 en Montrealo — en Esperanto-traduko, kompreneble. Suzano Roy, la estrino de la Esperanto-domo en Tririvero kaj la antaŭa estrarano de ESK / antaŭa membro de la LKK por Montrealo, skribis, ke ĝi ne speciale rilatas al Kebekio, « sed ĝenerale al nia nordeca kaj gastama lando, kiun oni povas tute prave nomi 'Kanado' ». Suzano pensas ke estas nenio politika en la kanzono mem, sed sciante, ke Vigneault subtenis naciisman movadon, homoj interpretas ĝin kiel kebekian — laŭ Suzano, ĝi ne estas esence tia. Legu pli pri tiu ĉi kanto en la sekva artikolo.

## Nova LKK-ano por Montrealo!



La Montreala LKK bonvenigis al sian kernan rondon plian teamanon : Bob Williamson, el Nov-Skotio (longdaŭra aktivulo kaj sekretario de Kanada Esperanto-Asocio). Do nun la kerna teamo konsistas el Normand Fleury (la prezidanto), Ĵenja Amis (sekretario + komunikado), Garry Evans (kasisto), kaj du vicprezidantoj: Nicolas Viau kaj Joel Amis, kaj Zdravka Metz (volontuloj), kiu ankaŭ planas transpreni la dosieron de ekskursoj, kiun gvidis Suzanne Roy (kiu ricevas plej sincerajn dankojn pro ŝia grandega laboro). Ni ĝojas, ke dank' al teknologio, ni povas bonvenigi al niaj rondoj ankaŭ aktivulojn, kiuj ne nepre loĝas en nia urbo. Krom la kerna teamo (Montrealanoj + Bob), la tuta teamo inkluzivos plurajn teamanojn kaj helpantojn el diversaj landoj (interalie Francio kaj Usono). Ni bonvenigas helpantojn kaj volontulojn el ĉiuj landoj. La nova volontula formularo (kaj la nova retejo) haveblos en 2021 — sekvu nin en Facebook kaj kontaktu nin se vi havas proponojn aŭ ŝatus esti en la teamo ! [info@esperanto2020.ca](mailto:info@esperanto2020.ca).



# Mia Lando !

## Tri popolaj himnoj : Kebekio, Belgio kaj Aragono (Hispanio)

*Eduardo Berdor*

### Enkonduko

Komence, oni petis min komenti la kanton *Mon pays*, pro tio ke mi iom fakas pri francalingva muziko en Kanado. Tamen, ĉar mi neniam loĝis tie, mi multe pli konas la nuntempan muzikon, aŭ almenaŭ kantistojn, kiuj iĝis famaj antaŭ jardekoj sed kiuj ankoraŭ estas aktivaj aŭ almenaŭ estas famaj, ĉefe se oni aŭskultas ilin en radio aŭ se la ĝenerala franca publiko konas ilin. Mia scifonto koncerne la temon estas plejparte la kanada radiostacio *Ici Musique*, kiu ne aŭskultigas muzikon antaŭa ol 1990, krom klasika aŭ apartaj omaĝoj. Anstataŭ analizi la kanton de Vigneault sola, sen komparado, mi preferas kompari ĝin kun aliaj kanzonoj. Kun kiaj do ? Nu, kun similaj kantoj en aliaj partoj de la mondo, kiujn la homoj scipovas kanti sen kontroli la tekston, kiuj donas al ili fortajn sentojn. *Le-plat-pays*-n mi konas pro tio, ke ĝi estas tre konata en franclingva Eŭropo, kaj ankaŭ konsekvence de mia intereso pri Jacques Brel. Krome, mi loĝis en Belgio dum unu

jaro. Tio certe impulsis min doni pli da atento al liaj pli belgaj kantoj, kiel ankaŭ *Les Flamandes* aŭ *Bruxelles*.

**Mon pays** (*Mia lando*, 1965)



Ja *Mon pays*, de Gilles Vigneault, estas tre konata kanto en Kebekio. Ĝi estis komisiita por filmo. Ankaŭ elstare Monique Leyrac famigis tiun ĉi kanton kaj venkis festivalon en Sopot, Pollando,

interpretante ĝin. Ginette Reno estas alia fama kantisto, kiu eĥis ĝin. Vigneault ne akompanas sin per muzikilo. La kanto estas rapida kaj li preskaŭ krias ĝin. La versoj estas rapidaj, kaj la kanto multe malpli solena ol la aliaj du, ĝi estas preskaŭ festena. La ĉefa instrumento estas piano, sed oni aŭdas ankaŭ violonojn. La voĉo ne estas senriproĉa, sed ja pasia, kaj tio kompensas la tuton. La studia versio komprenigas multe pli bone la valsan 3/4-ritmon.

Mi persone preferas la version de Leyrac, pli lirikan, kiu elvokas la tiamajn kantistojn francajn, kiel Juliette Gréco, aŭ kebekiajn, kiel Pauline Julien. Gilles Vigneault verkis aldonan kanton *Mon pays II* kelkajn jarojn poste.

*Mon pays* estas la plej harmonia el la tri, kvankam la akordoj estas sufiĉe normalaj : ne estas naŭtakordoj (ekz. D9), nek pligrandigitaj (escepte de Cmaj7), nek malpligrandigitaj. Jen la skemo, pli detala kaj longa ol por la aliaj :

E, F#m, B7, E  
 F#, Abm, C#7, F#  
 E, F#m, B7, G#7  
 C#m7, F#m7, B7, E, Em (D7 je la antaŭlasta strofo)

Em  
 Cmaj7  
 Am7  
 D7  
 G, Bm7

E7, Am  
 C, F#7  
 B7, Em  
 C7, B7

× 3  
 Lasta strofo :  
 G, Am, D7, G  
 A, Bm7, E7, A  
 G, Am, D, B7  
 Em, Am7, D7, G

Tio sekvas la usonan tonsistemon, kie A estas La, B estas Ti, C estas Do, ktp, kaj kie « m » indikas minoran tonon, male al maĵora.

Jen la originala teksto por niaj franclinvaj legantoj :

Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'hiver  
 Mon jardin ce n'est pas un jardin, c'est la plaine  
 Mon chemin ce n'est pas un chemin, c'est la neige  
 Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'hiver.

Dans la blanche cérémonie  
 Où la neige au vent se marie  
 Dans ce pays de poudrerie  
 Mon père a fait bâtir sa maison  
 Et je m'en vais être fidèle  
 À sa manière, à son modèle  
 La chambre d'amis sera telle  
 Qu'on viendra des autres saisons  
 Pour se bâtir à côté d'elle

Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'hiver  
 Mon refrain ce n'est un refrain, c'est rafale  
 Ma maison ce n'est pas ma maison, c'est froidure  
 Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'hiver

De mon grand pays solitaire  
 Je crie avant que de me taire  
 À tous les hommes de la terre

Ma maison c'est votre maison  
Entre mes quatre murs de glace  
Je mets mon temps et mon espace  
À préparer le feu, la place  
Pour les humains de l'horizon  
Et les humains sont de ma race

Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'hiver  
Mon jardin ce n'est pas un jardin, c'est la plaine  
Mon chemin ce n'est pas un chemin, c'est la neige  
Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'hiver

Mon pays ce n'est pas un pays, c'est l'envers  
D'un pays qui n'était ni pays ni patrie  
Ma chanson ce n'est pas une chanson, c'est ma vie  
C'est pour toi que je veux posséder mes hivers

Laŭtekste, la kanto havas diversajn interesajn trajtojn :

**La malvarmo** kaj la **vintro**, ĉiea en la kanto, eble kiel simbolo de kultura izoleco (« granda lando soleca »), kune kun pejzaĝaj aludoj.

**Vento** : « la blanka ceremonio, en kiu neĝo kaj vento geedziĝas », « mia lando estas neĝblovado ».

**Malvarmo** : « *froidure* » (malnova vorto, ankaŭ loka).

**Glacio** : « inter miaj kvar muroj el glacio ».

**Neĝo** : « la blanka ceremonio, en kiu neĝo kaj vento geedziĝas ».

**Ebenaĵo** : « mia ĝardeno ne estas ĝardeno sed ebenaĵo ».

**Gastamo** : « al la invitĉambro oni venos el aliaj sezonoj », « mi krias al ĉiuj homoj de la tero : mia

domo estas via domo ».

**Frateco** inter la homoj : « la homoj estas el mia raso ».

La **ne-ŝtata** trajto de la loko : plurfoje « mia lando ne estas lando, sed... », sed oni povas ankaŭ kompreni, ke la aliaj trajtoj estas pli gravaj ol tiu pri la reĝimo de la teritorio.

La kanto iĝas grava deklaro : kanto egalas al viva mesaĝo.

Ĝi estas la plej naciisma el la tri kantoj, sed Vigneault ĉiam neis, ke lia intenco estis komponi kebekian himnon.

**Le plat pays (La plata lando) (1962)**



Vi, kara leganto, probable bone konas tiun ĉi kanton kaj ties interpretiston. Do mi ne tro



parolos pri Jacques Brel, sed ja pri lia vivo, se ĝi gravas por analizi la kanton. Oni povas demandi sin, kiu estas tiu ebena lando. Jacques Brel naskiĝis tuj apud Bruselo, vivis multajn jarojn en Parizo, kaj pro pulma kancero finis sian karieron relative juna, kaj travivis siajn lastajn jarojn en la Markizinsuloj, kie li ripozas. Brel estis franclingva bruselano. *Le plat pays* estas unu el liaj malmultaj kantoj, kiujn li kantis ankaŭ en la flandra : « Mijn vlakke land ». Kelkaj diras, ke la kanto aludas Flandrion. Mi ne tute konsentas : estas multaj referencoj, kiuj estas aŭ tutbelgaj aŭ eĉ pli valonaj ol flandraj.

La kanzono estas relative mallonga : ĝi daŭras 2:40. Ĝi aperis en 1962 en la albumoj *Les Bourgeois* kaj *Madeleine*, depende la formatoj. Verŝajne, la svisa poeto Jean Villard inspiris lin per sia poemo *La Venoge*.

Nun, ni interesiĝos pri la muzika enhavo. Ĉi-kaze la strofoj multe similas inter si. La skemo de ĉiu strofo sekvas :

C, E, C, E, C, Am, Dm, G7, C, E, Am, Dm, G7, C.

Tio signifas, ke ĉiu strofo havas tri partojn, kaj ke la dua kaj la tria samas. Do, krom per la teksto, kiel distingiĝas la strofoj ? Per aldono de instrumentoj kaj la voĉa nuancado (*rallentando*,

*ad libitum, staccato...*), estas pluraj versoj, sed la tendenco estas tiu. La akordo Mi maĵora estas ofte septakorda, sed en la transskribo, kiun mi trovis, ne estas tia. La fingroj plektras rapide la kordojn. En la dua strofo aperas stranga sono, kiu povus esti klavaro, aŭ eĉ teremino. En la lasta strofo violonoj eniras kaj akompanas la voĉon per multa sento. La voĉo finas kontentiga, post iom da suferado. La teremino finas.

La kanto elvokas la pejzaĝon de la okcidentflandraj prauloj de sia aŭtoro. La strofoj respondas al ĉiu geografia ĉefpunkto kaj al ĉiu sezono. Ĝi estas unu el la plej poeziecaj kantoj de Brel. Se oni detale tralegas la tekston, oni povas eltiri tiujn ĉi karakterizojn :

**La naturo** de la lando, ne ĉiam facile privivebla, sed ene de tiu ĉi temo estas pluraj subtemoj : la Norda Maro kaj la strando : rokoj malmultaj, dunoj, potencaj tajdoj.

Brumoj kaj grizaj nubaj ĉieloj : « brumoj, kiuj ree kaj ree venas » ; la ĉielo estas tiel malalta, ke kanalo perdiĝis, tiel malalta, ke ĝi humiligas homojn ; ĝi estas tiel griza, ke « kanalo pendumiĝis », ke ĝi estas pardonenda, t.e., ĝi estas ankaŭ humila.

Ventoj : orienta, okcidenta, norda kaj suda, je la fino de ĉiu strofo. Ĉiu vento havas malsimilan

karakteron. La orienta rezistema, tiu okcidenta volema, kzavaŭ ĝi estus homa, la norda disigema kaj rompema kaj tiu suda kantema.

Pluvo : « vojoj de pluvo kiel nura vesperadiaŭo ».

Somero : jes ja, somero alvenas, kaj la homoj pli ĝojiĝas : suden ni atingus Italion, landon de vivemo. « La filoj de novembro, kiuj revenas en majo » : probable ili estas viroj, kiuj faris la militservon dum 18 monatoj en tiu epoko.

La **sentto pri la lando**, ĉiam ĉe la lasta verso :

Aparteno : « la plata lando, kiu estas la mia ».

Monotono : « La tagoj nura vojaĝo »,

« porĉiame », « la ondoj », ripetoj.

Du partioj kiel du fratinoj : Frida la blonda kaj Margot — tipa flandra nomo kaj tipa franclingva nomo, simboloj de Flandrio kaj Valonio.

**Pejzaĝoj :**

Loĝantara denso : la maro estas la « lasta dezerta tereno ».

Manko da montoj : « katedraloj kiel nuraj montoj », « plata lando ».


Arĥitekturo : preĝejoj kaj katedraloj — « katedraloj kiel nuraj montoj », « ŝtonaj diabloj alkroĉantaj la nubojn », « nigraj sonorilturoj kiel festaj stangoj ».

Rivero : Escaut en la franca, Schelde en la nederlanda — ĝi estas simbolo de unio, ĉar ĝi trairas la tutan landon de sudo al nordo.

Terkulturado : « la ebenaĵo estas fumanta », ĉar estas varme kaj oni rikoltas.

Amuze, en la komikso *Asterikso en Belgio*, belga ĉefo diras : « Dans ce plat pays qui est le mien, nous n'avons que des oppidums pour uniques montagnes » — « En tiu plata lando mia, ni havas nur opidumojn kiel solajn montojn ». Ĝi estas referenco al la verso « Avec des cathédrales pour uniques montagnes » — « Kun katedraloj kiel solaj montoj ».

**Somos (Ni estas) (1991)**



José Antonio Labordeta estis ĉefe kantisto-aŭtoro, fama en tuta Hispanio, sed kiu okupiĝis ankaŭ pri

politiko dum la lastaj jaroj de sia vivo. Li faris unu jaron la enkondukan prelegon al la Lokaj Festoj de Zaragozo (la plej granda urbo de la regiono, la kvina de Hispanio). Nun la plej granda parko de la urbo havas lian nomon, kvankam multaj plu nomas ĝin Parque Grande (Granda Parko). La plej fama kanto de Labordeta estas *Canto a la libertad* (Kanto al la libereco'), kies tekston multaj aragonanoj lernis parkere. Vidu, ke tiu ĉi kanto aperis en 1975, la jaro kiam la diktatoro Franco mortis, sed *Somos* aperis sufiĉe poste, en 1991. Labordeta forpasis antaŭ dek jaroj. Tial, oni jam submetis proponon, kiu sugestis la adopton de tiu ĉi kanto kiel himno de Aragono. Siatempe, Labordeta ankoraŭ vivis kaj la tiamaj dekstremaj politikaj partioj oponis la adopton de tiu himno. Tamen, dum la lastaj jaroj iĝis kutimo kanti la kanton tuj antaŭ la komenciĝo de la lokaj festoj de Zaragozo.

La nuntempa himno estas instrumenta verko fare de grava loka komponisto, fama aparte pro ties komponaĵoj por televidaj elsendoj. Tamen, malmultaj homoj konas ĝin. Mi eĉ ne scias, ĉu ĝi havas tekston. Mi supozas, ke jes, sed neniuj konas ĝin. Mi iam ludis tiun himnon en simfonia orkestro per violonĉelo, sed tiu estus alia rakonto.

Pro la famo de Labordeta kaj la komuna petskribo,

kiujn mi menciis, mi konsideras, ke la aragona himno ĉiaokaze devus esti *Somos* (Ni estas), ĉar ĝi vere priskribas la regionan pejzaĝon, karakteron kaj vivon. *Canto a la libertad* estas potenca, vibriga, igas nin kanti ĝin elkore kaj laŭte, sed ĝi estas kontraŭdiktatura, pri klopodo atingi la liberecon.

Post tio, ni analizu la kanton *Somos*. Muzike, ĝi estas simpla, kaj faras progreson alten, dum la kanto antaŭeniras. La skemo estus I, I7, V, V7, I (du strofoj) en Do maĵora. Poste oni supreniras du tonojn kaj atingas Mi-on, laŭ la sama skemo. La voĉo laŭtiĝas kaj pasiiĝas pli kaj pli, kaj ankaŭ la sono de la gitaro. Kaj fine, en la lastaj strofoj, la skemo tute samas, sed, ekde So, la dua septakordo estas opcia. Do, entute, de la komenco ĝis la fino de la kanto la voĉo altiĝas kvinton. Nek la voĉa parto nek la gitara parto estas postulemaj, krom pro tio, ke la kanto komenciĝas de malalta noto. Cetere, Labordeta havis, laŭ mi, baritonan voĉon, do ne estas facile, aparte por virinoj, kanti tiel. Ju pli ili havas sopranecan voĉon, des pli atingeble. Aliflanke, la gitara ludado per la dekstra mano estas tutsimpla : per dikfingro, oni plektras ĉiujn kordojn sinsekve per 4/4 ritmo 1... 2, 3..., kie 1 estas duoble pli longa ol 2 kaj 3.



Laŭtekste, la kanto havas diversajn interesajn trajtojn :

**Homoj kiel naturo**, kiuj suferas : « maljunaj arboj batataj de la vento, kiu vipas el la maro » (notu, ke Aragono ne havas marbordon, sed la maro estas relative proksima) ; « softaj kiel argilo, duraj kiel rokarejo », kaj ripetiĝas en la lasta verso « ni estas kiel tiuj oldaj arboj... ».

La **vivo pasas**, homoj mortas, tradicioj perdiĝas : « ni perdis kunulojn, pejzaĝojn kaj esperon dum nia paŝado », « ni perdis nian historion... post malfacila batalado ». Aragono estis grava reĝlando dum la Mezepoko, ĉu ni povas legi interlinie, ke oni sentas nostalgion al tiu grandioza tempo? Laŭ mi ne, tio pli probable rilatas al la Frankisma periodo, kiam ĉio banadis en komuna imperia ideala Hispanio.

La komuna rajta **lukto** per la paroloj, por la tero : « ni sinkis en la vortojn la spurojn de la lipoj », « ni luktis (...) en niaj pluvaj kampoj ».

Frateca **espero** : « ni plantos novajn radikojn... tempoj, kiu kunportos (...) fratecon », « per la futuro ni faros kanton al la espero ».

**Ni** : Ĉiu komenco de strofo enhavas la pronomon « ni » : ekzemple, « ni faros », « ni estas », « ni perdis »... Tiu « ni » ege implicas la komunecon : ni faras ĉion kune, ne individue. Ankaŭ en *La*

*Espero* la vorto « ni » havas kunigan sencon.

## Konkludo

Ĉiuj kantoj aludas la veteron kaj la klimaton. Ili elvokas krudajn sentimajn pejzaĝojn, sed kiuj malgraŭ tio povas esti amataj ; ili ellasas pasiojn : fortajn, sentajn, perfortajn, tenerajn.

En *Mon pays* kaj *Somos* la ideo pri frateco elstaras. Krome, ĝi estas pli implicita kaj simbola en *Le plat pays*. La frateco en Belgio estu inter ĝiaj civitanoj, en Aragono inter luktantoj kaj terkulturistoj, en Kebekio pli mondskala. Ne estas referencoj al amo, almenaŭ ne al amo inter du homoj, escepte en *Mon pays*, kies lasta linio, kaj sekve komentinda, estas « Pro vi mi volas posedi miajn vintrojn ». Ĉu tiu « vi » celas virinon, aŭ la landon mem? Mi preferas la unuan solvon.

Ĉiuj tri kanzonoj devas esti kantataj senteme kaj priskribas ian momenton : vintron, rikoltadon, ktp.

## Aŭskultu

Vi povas trovi ĉiujn tri kantojn per tiuj ĉi ligiloj :

*Mon pays* : <https://youtu.be/G551bmF4AhA>

*Le plat pays* : <https://youtu.be/l8bQFvTRzBM>

*Somos* : <https://youtu.be/qgOVPEVGtMo>

# La 100-a Kongreso de la Sildava Esperanto-Asocio : Impresoj pri modela kongreso

*Francisko Lorrain*

*L'auteur a participé cet été, après une longue, épuisante, mais exaltante traversée de l'Atlantique en chaloupe à rames, au 100<sup>e</sup> Congrès annuel de l'Association sildave d'espéranto. Il en est revenu — mais en voilier cette fois — ébloui et conquis. Il nous livre ici ses impressions.*

Lastsomere, junifine, mi havis la ŝancon partopreni en la tutmonde alte taksata Kongreso — ĉi-jare la 100-a — de tiu asocio, tre aktiva en la eŭropa movado. Tio estis por mi eksterordinara kaj ege riĉiga sperto. Tial mi deziras dividi kun vi miajn impresojn.

Unue, ĉar mi promesis neniam plu aviadili (pro la troaj forcejgasaj eligaĵoj de tiu bedaŭrinda veturrimedo), mi decidis transiri la Atlantikan Oceanon per remboato. En la granda boato, evidente verda, kunvojaĝis dek du fortikaj geesperantistoj, entuziasmaj geamikoj de la klimato, kiuj remis

(sesope ĉiuvaĉe), dum mi eluzis mian sanon ĉe la stirilo. Ni estis do entute dek kvar, se enkalkulian Esperantan flagon.



Malgraŭ mia terure streĉa kaj laciga laboro ĉe la stirilo, mi trovis la kvarsemajnan vojaĝon sufiĉe agrabla. La vetero, feliĉe, estis dolĉa, varmeta, kaj miaj bravaj remantoj tagnokte kantis belajn maristajn kantojn, kompreneble en Esperanta versio. Neforgesebla sperto ! Ni fiŝkaptis ĉiun tagon, kaj havis senfinajn amikajn disputojn pri

la ĝustaj Esperantaj nomoj de la kaptitaj, kaj eĉ ne kaptitaj fiŝoj. Dank' al sunpaneletoj ni havis pli-

malpli fidindan satelitan aliron al Interreto kaj povis do preskaŭ ĉiutage informi pri nia pozicio La Gazeton, same kiel la aliajn gravajn mondajn Esperantajn revuojn.

Sed tio estis nur la komenco de nia vojaĝo. Pro navigada erareto, ni albordegis en Irlando anstataŭ Francio, sed, vidante nin, verdulojn, neantaŭvidite alveni, kaj krome en verda remboato, la loĝantoj de la same verda Irlando varmege akceptis nin. Ni fine vendis al ili nian boaton kaj de tie veturis, trajne aŭ per direktebla balono, ĝis Klovo, la sildava ĉefurbo, kie ni estis afablege akceptitaj kaj gastigitaj ĉe diversaj sildavaj familioj.

Sekvis ege kortuŝa akcepto ĉe la reĝo Muskaro la 15-a, mem esperantisto kaj praktikanto de la remarto, kiu faris al ni multajn trafajn demandojn pri nia tuta vojaĝo. Li eĉ petis kunremi kun ni dum la revenvojaĝo ! Sed ni devis bedaŭrinde seniluziigi lin, pro la jam konkludita vendo de nia boato.

La kongreson malfermis la reĝo mem, akompanate de sia tuta kortego en ceremoniaj vestoj. Ni ege kortuŝiĝis pro tio, ke ĉiu el ili estis



zorginta enmeti ian verdaĵon en sian kostumon. Niajn vangojn malsekigis larmoj, pro la sincera, pli ol cent-jara, sindevigo de tiu tuta lando por nia Afero. Reciproke la sildavajn gravulojn tre emociis la tradiciaj salutoj de la tutmonda esperantistaro al ilia lando kaj al la kongreso.

Sildavujo estas lando malpli granda ol Islando, kun 267 634 loĝantoj laŭ la lasta popolnombro. Ĉeestis la kongreson ducent dek kvar homoj, el preskaŭ tricent landoj (kompreneble, multaj kongresanoj estis civitanoj de pli ol unu lando). La programo buntegis. Ĝi enhavis abundon da ĉiuspecaj artaj spektakloj. Ne mankis prelegoj, debatoj, metiejoj pri interesaj kaj internacie gravaj temoj. Ekzemple, mi ĉeestis pasivekan prelegon pri la historio de trikado en Sildavujo,

en kiu ni povis mem ekzerciĝi en la sildava trikarto, uzante lanon el la t.n. « verdaj ŝafoj » (fakte bluecaj) de la zmilpata antaŭmontaro.

Merkrede, kun ekskursaj grupo, ni partoprenis en la tradiciaj azenaj vetkuroj en la vilaĝo Teszniko, 90 kilometrojn de Klovo, kaj tiu sperto tiel



entuziasmigis nin ĉiujn, ke mi planas organizi similan vetkuradon dum la venonta montreala UK.

Interesis min ankaŭ lerni pri la historio de la sildava lingvo. Pro misteraj historiaj kaŭzoj, ĝi tre proksimas al iu dialekto de la flandra lingvo, malgraŭ sia slaveca aspekto kaj ofte cirila skribo. Mi ĉe dumkongrese diligente studadis la sildavan per Duolingo, kun iom da sukceso, mi devas diri. Mi cetere daŭre studas ĝin kaj planas venontjare fondi asocion de ŝatantoj de tiu lingvo, kun biblioteko de sildava literaturo. Jam la sildava ministro pri edukado promesis sendi al mi kolekton de la plej gravaj ĉefverkoj de tiu literaturo.

Intertempe mi komencis esperantigi la plej grandan ĉefverkon de la sildava literaturo, la 14a-jarcentan dek-mil-versan epopeon, *La Kanton de Otokaro*. Mi jam tradukis ĝiajn kvin unuajn versojn kaj planas grandiozan, tutagan muzikan spektaklon pri ĝi, kiun mi intencas organizi por la 125a UK en 2040, kiu okazos ĝuste en Klovo, koincide kun la 765a datreveno de la zileherumaj okazaĵoj,



markantaj la komencon de la sildava ŝtato en la jaro 1275. La nombro 765 havas gravan signifon en la sildava numerologio, tial ke ĝi egalas  $5 \times 9 \times 17$ . Tiuj tri primaj nombroj ĉefrolas en la sildava pramitologio.


Iuj demandos, kiel mi povas antaŭvidi, ke la 125a UK okazos en Klovo, dum UEA mem ankoraŭ ne scias pri tio? Ĝuste tion ebligas kun precizeco certigi la sildava numerologio! La tuton mi klarigos en prelego, kiun mi preparas por la 125-a.

Tiu 100-a sildava kongreso estis por multaj el la partoprenantoj vivŝanĝa sperto. Tiom da lernado, tiom da emocioj, tiom da malkovroj! Fakte preskaŭ la duono de nia montreala skipo decidis resti en Sildavujo pro renkontitaj tie vivpartneroj. Post la solena malfermo, la adiaŭoj estis korŝiraj. Ĉiuj el la skipanoj, kiuj ne

restis tie, promesis denove traremadi la Atlantikon venontjare por ĉeesti la 101-an Sildavan Kongreson, okazontan de la 20-a ĝis la 27a de junio 2020. (Notu, preterpase, ke  $20 = 2 \times 2 \times 5$  kaj  $27 = 3 \times 3 \times 3$ , kaj ke krome  $2020 = 2 \times 2 \times 5 \times 101$  !!!)

Resume pri la Sildava Kongreso : impresa,

rekomendinda — kaj imitinda !  
 Imitcele, mi sugestas, ke ni invitu  
 reĝinon Elizabeto la 2-a malfermi  
 la venontjaran montrealan UK-  
 on. Tio aldonos multe da prestiĝo  
 al nia komunumo. Mi eĉ  
 proponas inviti ŝin partopreni en  
 la tuta UK ! Mi certas, ke ŝi tuj  
 akceptos la inviton, ĉar ĝuste nun  
 nenio okazas en Britujo — la  
 sildava ambasadoro en tiu lando,  
 kiun mi renkontis en Klovo,  
 konfidis al mi, ke ŝi nuntempe



terure enuas en siaj palacoj.  
 Fine nia dekkvaropo (se enkalkuli  
 la flagon), minus kvin (inter kiuj  
 ne estis la flago), reveturis al  
 Montrealo per velŝipo. Strange,  
 dumveture, neniuj plendis, ke  
 mankas al ili remilon (aŭ stirilon)  
 en la mano ! Ĉe nia alveno en la  
 montreala haveno, ni estis feste  
 kaj flore bonvenigitaj de la centoj  
 da tiurbaj esperantistoj, kiuj de  
 monatoj sekvis nian transoceanan  
 odiseadon.



**Montrealo-2022 :**  
**venu eĉ pli multnombre al**  
**Montrealo—Kebekio,**  
**Kanado, Ameriko !**  
**Via, Montreala LKK**

# Kial varmiĝas la klimato ?

## Vidpunkto de fiziko-kemiisto<sup>1</sup>

*Werner Fu  (Garching  e Munkeno, Germanujo) kunlabore kun Francisko Lorrain (Montrealo, Kanado)*

Multaj homoj havas la impreson, ke la scienco pri klimato estas ege komplika afero, baziĝanta nur sur amplekseĝaj kalkuloj fareblaj nur de t.n. superkomputiloj. Plurilate tio ĝustas. Tamen la klimatvarmiga efiko de la forcejaj gasoj  eestaj en la atmosfero estas *baze* relative simpla fenomeno, deduktebla el bone konataj fizikaj leĝoj, per ne tre komplikaj kalkuloj. Tion ni vidos en  i tiu artikolo, kiun ni skribis por tiuj, kiujn la klimata demando aparte zorgigas, kaj kiuj volas pli detale kompreni, kial la klimatoscienco konkludas, ke *homa aktivado* estas la  efa kaŭzo de la *nuna* klimatvarmiĝo.

### Pasintaj klimat anĝiĝoj

Dum la pasintaj geologiaj eraoj, la tera klimato plurfoje forte  anĝiĝis. Tion kaŭzis diversaj naturaj fenomenoj. Ekzemple, laŭlonge de la jarmilionoj la kontinentoj drivas, kio  anĝas la distribuon de teroj kaj maroj sur la terglobo, kio siavice  anĝas

la marfluegojn kaj klimatojn. Ankaŭ periodoj de kontinentvasta vulkanismo forte influis la klimaton, pro la grandegaj kvantoj da eligita polvo, kiu povis dum jaroj resti en la aero kaj tiel parte bloki la sunradiadon. Same povas okazi post la falo de granda meteoroido, interalie pro la sekvaj grandskalaj brulegoj poluantaj la atmosferon.

La glaciepokoj de la pasinta miliono da jaroj rilatas al diversaj astronomiaj fenomenoj. Tion unue montris la astronomo kaj klimatosciencisto Milutin Milankovi  (1879–1958). Ekzemple,  anĝoj en la discentreco de la tera orbito, en la kliniĝo de la terakso, ktp, laŭ t.n. Milankovi -cikloj, notinde influas la klimaton. Same  anĝoj en la suna aktiveco.

###  u faktoj aŭ nur kredo ?

Pri la kaŭzoj de la nun observata klimatvarmiĝo ekzistas multaj supraĵaj opinioj.  iu estas libera,



kredi faktojn aŭ ne. Tamen ekzameneblaj faktoj estas sur malsama nivelo ol nura kredo. La fizikaj leĝoj, kiuj regas la klimaton, estas la samaj kiel tiuj regantaj la konstruadon de pontoj, nubskrapuloj kaj komputiloj. Se ĝenerale oni ne timas transiri ponton aŭ supreniri en pluretaĝa konstruaĵo, se oni ĉiutage uzas komputilon, kial tiam oni ne fidu je la klimatoscienco? Povas esti, ke ĝiaj konkludoj surprizas iujn, eĉ multajn. Sed scienco abundas je surprizaj konkludoj!

### Interago inter materio kaj lumo


Por pli bone kompreni, kio influas la tersurfacan temperaturon, necesas unue iom scii pri kelkaj bazaj fizikaj fenomenoj. Eble vi jam bone konas iujn el ili, sed eble ne ĉiujn. Pacience tralegu ĉi tiun sekcion; via pacienco poste rekompenciĝos! La tersurfaco ricevas energion praktike nur de la suno. Kompare, la varmo fluanta el la interno de la tero estas nur 0,03 % de ĝi.

Ajna lumoj (ĉu el la suno, el fajro, ktp) konsistas el elektromagnetaj ondoj, parte videblaj per la homa okulo, parte nevideblaj. Ekzemple, la infraruĝa kaj ultraviola lumoj estas al ni nevideblaj, kvankam iuj bestoj perceptas parton de ili. Ankaŭ la radio-ondoj estas lumoj, same nevideblaj al ni. Tiujn nevideblajn ondojn ni kapablas tamen percepti kaj mezuri, uzante

specialajn aparatojn — antenojn, kameraojn, ktp, laŭ la speco de ondo.

Jen kvar bazaj fenomenoj rilatantaj al la interago inter materio kaj lumoj.

1. Ĉiu korpo konsistas el atomoj aŭ molekuloj, senĉese moviĝantaj kaj koliziantaj. Ju pli alta la temperaturo de korpo, des pli rapida tiu interna moviĝo. Inverse, ju pli rapida la interna moviĝo (pro ajna kaŭzo), des pli alta ĝia temperaturo.



**Bildo 1. Tersurfaca temperaturo kaj ricevata suna energio inter 1880 kaj 2019 (vidu detalan priskribon fine de la artikolo).**

2. Alia grava fenomeno, plej ordinara afero por ni ĉiuj, estas, ke, kiam ajna lumo trafas korpon, parto de tiu lumo povas trairi la korpon (kiel ĉe vitro, akvo aŭ aero), parto povas esti sorbata de ĝi, kaj parto povas rekte reflektiĝi al la ekstero de la korpo. La proporcioj de tiuj tri partoj multe varias, laŭ la konsistoj de la korpo kaj de la lumo trafanta ĝin.

3. Kio okazas, kiam lumo sorbiĝas en korpo ? Ĉiu lumo portas energion. Kiam parto de la lumo trafanta korpon estas sorbata de ĝi, la energio de la sorbata lumo estas transformata en aliajn formojn de energio : plej ofte en varmoenergion (la korpo varmiĝas), sed foje ankaŭ en elektran aŭ kemian energion. Kiam la suna lumo frapas la tersurfaco, la sorbata parto praktike tute transformiĝas en varmoenergion. Ekzemple, la sablo de plaĝo en suna vetero konsiderinde pli varmas, ol dum nuba vetero.

4. Ni ĵus vidis, ke ene de ĉiu korpo ĝiaj atomoj kaj molekuloj senĉese skuiĝas (des pli intense, ju pli alta ĝia temperaturo). Ofte okazas, ke, ene de skuata atomo aŭ molekulo el iu speco, la diversaj elektraĵoj komponantaj ĝin ankaŭ moviĝas unuj relative al la aliaj. Tiaj ŝarĝoj tiam elradias elektromagnetajn ondojn (videblajn aŭ ne), t.e. lumon. Ju pli alta la korpa temperaturo, des pli

intensa tiu elradiata lumo. Krome la lumaj ondoj longoj elradiataj de la korpo estas inverse proporciaj al ĝia temperaturo : dum la suno kaj ardantaj korpoj elsendas videblan radiadon, korpoj je ordinara surteraj temperaturoj elradias infraruĝon (percepteblan per specialaj kameraoj aŭ vidigiloj). Kompreneble, ĉar energio estas konservata, tiam la korpo mem perdas tiom da energio, kiom ĝi elradias.

### **Tersurfaca temperaturo**

Se ne estus klimatefikaj gasoj en la atmosfero, la tersupraĵo havus  $-18\text{ }^{\circ}\text{C}$  (celsiajn gradojn). Tiu nombro rezultas el la ekvilibro inter la alradiado de la suno kaj la temperaturdependa infraruĝa elradiado de la tero. Tio estas simpla kalkulo, se uzi la radiadoleĝon de Stefan-Boltzmann<sup>2</sup>, la precize mezuratan sunan alradiadon nunan ( $1367\text{ W/m}^2$ , t.e. 1367 vatoj en ĉiu kvadrata metro<sup>3</sup>) kaj la *albedon* (t.e. reflektipovon aŭ « blankecon ») de la tero, mezuratan de satelitoj. De satelitoj oni mezuras la teran albedon je 30 %, kio signifas, ke 30 % de la tuta suna lumo tuŝanta la teron reflektiĝas al la spaco, interalie pro nuboj, akvo, neĝo, glacio, ktp — sed fakte ĉio surtere reflektas pli-malpli grandan parton de la suna lumo. Do 70 % de la suna lumo estas sorbata de la tersurfaco. La atmosfero mem sorbas

neglekteblan parton de la suna lumoj.

Ekvilibro inter alradiado kaj elradiado neeviteble realiĝas, ĉar,

A. se iam ajn eliras de la tera sistemo iom malpli da energio, ol eniras, la tero kaj atmosfero plivarmiĝas, tiel ke ili denove elradias pli (pro punkto 4 ĉi-supre), ĝis kiam la radiada ekvilibro estas denove atingata.

B. Kaj, se iam ajn elirus iom pli, ol eniras, la tero kaj atmosfero malvarmiĝas kaj sekve elradius malpli (denove pro punkto 4), kio same realproksimigus al ekvilibro.

Tiel nepre atingiĝas *stabila* radiada ekvilibro.


La klimategifaj gasoj, aŭ *forcejaj* gasoj (kiel oni ofte nomas ilin), estas atmosferaj gasoj, kiuj sorbas iujn ondolongojn de la infraruĝa lumoj elradiata de la tersurfaco. Tial tiuj ondolongoj plejparte ne povas eliri tra la atmosfero. Ili povas

eskapi al la kosmo nur de altaj tavoloj de la troposfero, kie la aerdenseco estas jam sufiĉe malgranda. Sed tiuj maldensaj tavoloj malvarmas kaj tial radias nur malforte. (La troposfero estas la parto de la tera atmosfero inter tersurfaco kaj alteco de ĉirkaŭ 8–15 kilometroj, en kiu koncentriĝas ĉirkaŭ 90 % de la atmosfera maso.

En ĝi por la energitransporto regas la *konvekcio*, ne la radiado: varma aero leviĝas, ekspansias pro la malkreskanta premo kaj tial malvarmiĝas je 6,5 °C ĉiun kilometron de alteco. Tiu malvarmiĝo kun alteco estas bone sciata, speciale de aviadilistoj.)

Pro la reduktita elradiado de la malvarma alta tavolo la suno plivarmigas la tersurfacon, kaj ĉi tiu

varmigas la atmosferon, ĝis kiam la elradiado sufiĉos por restarigo de la ekvilibro, kompreneble kun tersurfaca temperaturo pli alta ol -18 °C. Evidente tiu estas la procezo A ĵus priskribita. Kaj tio estas la forceja efiko de la klimatogaso. (Notu, ke en la vitraj aŭ plastaj forcejoj oni observas



**Bildo 2. Vidu la priskribon fine de la artikolo.**



malsaman fenomenon : la ejo varmiĝas ĉefe pro tio, ke la vitro aŭ plasto malebligas konvektion de la ena aero al la ekstero.)

Por kalkuloj oni uzas la precize konatajn spektrojn de la forcejaj gasoj kaj iliajn nunajn koncentritecojn, el kiuj sekvas la altecoj de libera elradiado de ĉiu ondolongo ; de la altecoj estas sciataj la temperaturoj kaj la radiadintensoj. Oni kalkulas mezuman tersurfacan temperaturon de +15 °C. Tiu valoro kongruas kun la nun mezurata. Tia kalkulo de la forceja efiko estas ankoraŭ simpla, kvankam komputilo estas bezonata.

### **Radiada pelforto**

Por eviti ripeton de tiaj kalkuloj ĉe malgrandaj ŝanĝoj de forcejgasenhavoj, klimatologoj proponis por ĉiuj gasoj simplajn proksimumajn funkciojn, dependantajn de la koncentritecoj. Tiuj funkcioj permesas kalkuli por ĉiu gaso ĝian *radiadan pelforton* (vidu Vikipedion sub *forçage radiatif*, france, aŭ *radiative forcing*, angle). Ĉi-lastata rezultas el la spektro de la gaso kaj la altecodependo de la troposfera temperaturo, ambaŭ bone konataj. Por CO<sub>2</sub> kun la nuna koncentriteco kompare kun la t.n. antaŭindustria epoko (1850–1900) oni ricevas 2,04 W/m<sup>2</sup>, kvazaŭ la sunradiado estus kreskinta je tiu valoro. Por la aliaj gasoj – metano (CH<sub>4</sub>), nitrogenoksidoj

(precipe N<sub>2</sub>O), fluoro-kloro-hidrokarbonoj (ankoraŭ ne malaperintaj gasoj el malnovaj malvarmigmaŝinoj, kiel fridujoj kaj klimatiziloj), ozono (en la troposfero) kaj aliaj – la valoroj povas simple esti adiciataj.

Akvovaporo (gasforma H<sub>2</sub>O, do ne nuboj, konsistantaj plejparte el tre malgrandaj gutetoj da akvo) estas la plej efika klimatogaso. Ĝia koncentriteco (vaporpremo) ne estas libera variablo, sed dependas nur de la temperaturo, per simpla funkcio. Tial ĝi bezonas iom alian traktadon. Ĝi agas kiel plifortigilo de la aliaj forcejgasoj.

### **Pli ampleksaj kalkuloj**

La supre menciitaj kalkuloj, ĉiuj koncernantaj la ekvilibron, povas esti plifajnigataj, se konsideri ankaŭ la influon de nuboj kaj de aliiĝo de la albedo, la lokan variadon de temperaturoj kaj aliajn. La klimatologoj volas kalkuli ankaŭ la tempan evoluon ; ekzemple, ĉe aera varmiĝo, glacio degelas nur kun prokrastiĝo. Ĉio tio postulas multe pli grandan penon kaj eĉ necesigas superkomputilojn. Eble multaj homoj sentas, ke tiaj ampleksaj kalkuladoj estas netravedeblaj kaj pro tio dubas. Feliĉe por nia diskuto ni ne bezonas tiajn detalojn. Ni povas limigi nin al ekvilibroj.

## Homaj eligaĵoj

Kio pruvas, ke la nun observata pliiĝo de  $\text{CO}_2$  en la atmosfero devenas de homa agado ? Ni havas sufiĉe precizajn informojn pri la bruligado de fosiliaj materialoj tutmonde. Tiuj donitaĵoj kongruas kun la mezurata kreskado de la  $\text{CO}_2$ -koncentriteco, se oni konsideras, ke nur duono de la eligata  $\text{CO}_2$  estas rapide ligata en plantoj kaj oceanoj. La originon de la plimultiĝo de  $\text{CO}_2$  indikas ankaŭ la proporcio de la izotopoj  $^{13}\text{C}$  kaj  $^{12}\text{C}$  : tiu proporcio estas iom pli malgranda en fosiliaj brulaĵoj. Fakte ĝi malkreskas en la atmosfero kongrue kun la pliiĝo de homeligata  $\text{CO}_2$ .

La forcejgaso metano ( $\text{CH}_4$ ) nun originas ĉefe de agrikulturo, de karbominejoj, de likoj ĉe gasminado, kaj de putrado de organikaj materialoj, ekzemple en rubaĵejoj. Sed ekzistas ankaŭ naturaj fontoj de metano : la



**Marŝo por klimato kun Greta Thunberg (Montrealo, 2019).**

marĉoj kaj la degelantaj ĉiamfrostaj grundoj en la ekstremnordo.

Ĉe estonta varmiĝo, grandaj kvantoj da metano povus esti eligataj de tiuj degelantaj grundoj. Se tio okazus grandskale, la varmiĝo plirapidiĝus dramece kaj neinvertigeble. Ni nur esperu, ke tio okazos nur malgrandkvante tiel longe, dum ni sukcesos teni la varmiĝon sub  $2\text{ }^\circ\text{C}$  (ekde la antaŭindustria epoko). Ĝis nun la observata varmiĝo proksimas al  $1,1\text{ }^\circ\text{C}$  (Bildo 2, nigra kurbo).

La aliaj klimatogasoj praktike ne ĉeestis antaŭ la industria tempo. Ne ekzistas natura fonto de kloro-fluoro-hidrokarbonoj. Dinitrogenoksido ( $\text{N}_2\text{O}$ ) venas de ne-zorgema sterkado kaj sekva mikroba aktiveco.

## Komparo kun antaŭaj epokoj

La priklimataj antaŭdiroj ne dependas de iuj korelacioj, sed baziĝas sur kalkuloj kaj fizikaj leĝoj.

Tamen por kontrolo kaj plifajnigo oni ekzamenas la kalkulojn precipe per komparo de pasintaj temperaturoj kaj atmosferaj koncentritecoj de CO<sub>2</sub>, deriveblaj ekzemple de t.n. glaci-borkernoj (boritaj el glaĉeroj ĝis kiel eble plej granda profundo). Jam en la 1980aj jaroj oni povis reprodukti pli kaj pli bone ĉiujn detalojn de la temperaturhistorio de la lastaj 100 000 jaroj. Intertempe oni sukcesis tion fari ĝis antaŭ 800 000 jaroj kaj – malpli precize – ĝis multaj milionoj da jaroj. Pri tio vidu en Interreto sub *paleoklimatologio* (france, *paléoclimatologie*, angle, *paleoclimatology*).

### **Nuntempa varmiĝo**

La antaŭdiro ĉirkaŭ 1985 estis, ke nur post ĉirkaŭ dudek jaroj, konstatabla varmiĝo elmergiĝos el la kutima temperaturfluktuo de jaro al jaro (vidu ekzemple la artikolon de Werner Fuß en *Monato* 1988/03, p. 19).

Multaj homoj preferis atendi, ĝis la varmiĝo mezureblas. Sed jam en 1999 Michael Mann kaj kunlaborantoj publikigis studon de la temperaturhistorio de la lastaj du jarmiloj. En ĝi ili konstatis unuan indikon de mezurebla nuntempa varmiĝo, kvankam kun limigita statistika signifo. Multe kritikata estis tiu limigita certeco, sed ankaŭ Mann substrekis ĝin. Poste la konkludon de Mann

konfirmis multaj aliaj studoj tuj post 1999, kaj aparte en la lastaj jaroj, kun bona statistika signifo.

Tiu varmiĝo cetere pli kaj pli sentiĝas: ĉie glaĉeroj kaj mara glacio pli kaj pli fandiĝas, kaj, kiel atendate ĉe varmiĝo, plioftiĝas pli ekstremaj veterkondiĉoj (varmegaj epizodoj, inundoj, uraganoj, ciklonoj).

En Bildo 1, la ruĝaj kurboj kaj skalo montras la evoluon de la mezuma tersurfaca temperaturo mezurita inter 1880 kaj 2019. La nuna varmiĝo estas evidenta. La dika kurbo ruĝa, tiu de la 11-jaraj mezumoj, montras mezuritan temperaturaltiĝon de preskaŭ 1 °C inter 1885 kaj 2014, t.e. inter la unua kaj lasta 11-jaraj mezumoj. Bildo 2 montras, ke la tuta temperaturaltiĝo ekde la t.n. « antaŭindustria epoko » (1850–1900<sup>4</sup>) nun proksimas al 1,1 °C (vidu la nigran kurbon).

Antaŭ 1850, laŭ donitaĵoj el glaci-borkernoj, la koncentriteco de CO<sub>2</sub> estis kvazaŭ konstanta dum la lastaj dek mil jaroj (t.e. ekde la fino de la lasta glaciepoko).

### **Homkaŭzita varmiĝo**

Se reveni al Bildo 1, la flavaj kurboj en ĝi montras la evoluon de la suna energio ricevata de la tero. Tiu ricevata energio povas varii pro la diversaj



naturaj kaŭzoj, astronomiaj aŭ aliaj, menciitaj komence, kaj ankaŭ pro ŝanĝiĝanta suna aktiveco. Ĉi-lastaj tre malgrande varias, laŭ pli-malpli 11-jaraj cikloj. Ekde la 1950-aj jaroj la 11-jaraj mezumoj de la sunenergio (dika kurbo flava) eĉ tendencas malgrandiĝi.

Kontraste, ekde tiuj samaj kvindekaj jaroj, la tutteraj temperaturoj klare altiĝis. Evidente la malkreskanta ricevata sunenergio ne povas kaŭzi la observatan varmiĝon.

Ĉu aliaj naturaj kaŭzoj povus esti altigitaj la tutteran temperaturon, interalie vulkana aktivado? Tion malpravigas Bildo 2, kiu montras, ke la altiĝa tendenco de temperaturoj rilatas ĉefe al homa aktivado, ne al naturaj kaŭzoj.

Fidindajn kaj detalajn informojn pri la klimata demando, kolektitajn kaj daŭre kolektatajn de grandegaj skipoj de sciencistoj, vi trovos plurloke: en la diverslingvaj Vikipedioj, en la bonega [priklimata retejo de la usona NASA](#) (atentu, ke ĝi ofte uzas farenhejtajn gradojn, ne celsiajn), kaj en la [retejo de la UN-a IPCC](#) (angle, « Intergovernmental Panel on Climate Change »; france, GIEC, t.e. « Groupe d'experts intergouvernemental sur l'évolution du climat »; Esperante, Interregistara spertularo pri klimata ŝanĝiĝo).

## Organizitaj neistoj

Precipe en Usono estas kelkaj riĉaj privataj fondaĵoj (Heartland Institute, CO<sub>2</sub> Coalition, CFACT kaj aliaj), kiuj propagandas neadon de la homkaŭzata klimatovarmiĝo. Ili estas financataj de multimiliarduloj kiel la fratoj Koch aŭ la familio Mercer, kaj de interesata industrio. Tiu industrio malakceptas ŝtatan reguladon per klimatoprotektaj leĝoj.

La organizitaj neistoj unue kontestis la atendatan varmiĝon, poste neis, ke ĝi estas homkaŭzata, kaj ĉiuokaze ke ĝi havos rimarkeblajn konsekvencojn. Ili dissemas falsajn informojn, inventas malkonsentojn inter klimatologoj, diras, ke tiuj ne laboras zorgeme, aŭ ili ripetas delonge refutitajn argumentojn. La propagandistoj ne estas klimatologoj, ofte ne sciencistoj, kaj multaj estas advokatoj aŭ politikistoj. En Usono ili havis kaj havas grandan influon speciale je la Respublikana Partio kaj ĝiaj registaroj (Reagan, Bush, Trump) kaj je la dekstrismaj komunikiloj. Ili konfuzas multajn laikojn en la publiko. En Eŭropo ilia influo estas malpli granda, sed ĝi kreskas.

## Baze, relative simpla afero

Por ke oni ne konfuziĝu, mi ripetas, ke, baze, la nuntempa forceja efiko ne estas kompleksa afero.

Se ni preterlasas detalojn, speciale la rapidecon de la evoluo, se ni preterlasas kurbojn kiel la koloraj kurboj en Bildo 2 (kiuj rezultas el ampleksaj kalkuloj), ĝi baziĝas sur konataj fizikaj leĝoj, simpla matematiko kaj bone konataj donitaĵoj. Se ne estus forcejaj gasoj en la atmosfero, la tersupraĵo havus mezume  $-18\text{ }^{\circ}\text{C}$ . Se oni aldonas 300 miliononojn (ppm) da  $\text{CO}_2$ , ĝi varmiĝas al  $+14\text{ }^{\circ}\text{C}$ , t.e. al la mezuma temperaturo, kiun ni havis antaŭ kelkaj jardekoj. La kalkuladoj estas nekompleksaj kaj uzas nur establitajn donitaĵojn. Kial ne akcepti, ke plua aldonado de  $\text{CO}_2$ , ekzemple ĝis 400 miliononoj, kaj de pliaj klimatogasoj altigas la temperaturon pli, kiel matematike atendate? Kaj kial anstataŭigi laŭkvante konfirmitan kaŭzon de la varmiĝo per iu nekonata alia efiko?

### **Nun ni agu !**

La juna aktivulino Greta Thunberg senĉese ripetas, ke de jardekoj la sciencistoj avertadas nin pri la danĝero. Ŝi prave insistas, ke ni ne perdu plian tempon, vidante, ke nia  $\text{CO}_2$ -buĝeto elĉerpiĝos post nur naŭ jaroj. Kiel ŝi foje kaj refoje pledas, ni aŭskultu la sciencistojn, kiuj ne nur antaŭdiras, sed ankaŭ proponas rimedojn !

Estus dezirinde, ke rilate klimatoproblemojn politikistoj kaj publiko aŭskultu la sciencistojn tiel

atente, kiel rilate la tutmondan epidemion de la malsano COVID-19. La faktoj pri la klimatovarmiĝo estas multe pli certaj !

### **Pri la bildoj :**

*Bildo 1. Tersurfaca temperaturo kaj ricevata suna energio inter 1880 kaj 2019*

La grafikaĵo (Bildo 1, kelkajn paĝojn ĉi-supre) komparas, ekde 1880, la ŝanĝojn en la mezuma tersurfaca temperaturo (ruĝaj kurboj kaj skalo) kaj la suna energio ricevata de la tero (flavaj kurboj kaj skalo) en vatoj en kvadrata metro.

La maldikaj kurboj montras la jarajn valorojn, dum la dikaj montras la sinsekvajn 11-jarajn mezumojn. Ĉi-lastajn mezumojn oni uzis por redukti la « bruon » de ĉiujaraj ŝanĝoj, por pli klare montri la pli grandskalajn tendencojn. Oni elektis 11-jarajn mezumojn tial, ke la suna aktiveco havas naturan pli-malpli 11-jaran ciklon.

Fontoj : NASA/JPL-Caltech (la usonaj National Aeronautics and Space Administration, Jet Propulsion Laboratory kaj California Institute of Technology)

Noto : en la supra ruĝa skalo la nula temperaturvario (0.0C) respondas, arbitre, al la unua 11-jara mezumo tie montrata, tiu de 1885.

(El [retejo de la usona NASA](#))

Bildo 2. *Varioj de la tersurfaca temperaturo ekde la t.n. « antaŭindustria epoko »\**

La nigra kurbo (Bildo 2 kelkajn paĝojn ĉi-supre) montras la observatajn tutterajn mezumajn variojn de la tersurfaca temperaturo. (NASA)

La sambilda verda kurbo montras la variojn nur el naturaj kaŭzoj. (El la raporto de la U.S. Global Change Research Program – USGCRP – en 2017)

La sambilda ruĝa kurbo montras la variojn atribueblajn nur al homa aktiveco, t.e. ĉefe al homeligataj forcejaj gasoj kaj alia homa poluado. (El la sama raporto)

La ĉefa kaŭzo de la altiĝo de temperaturo dum la industria epoko montriĝas esti homa aktiveco. Kiam

oni adicias la naturajn variojn (verda kurbo) kaj la homkaŭzitajn (ruĝa kurbo), tio nur aldonas varieblon al la ruĝa kurbo, sen ŝanĝi la ĝeneralan tendencon.

(La precizajn fontojn de la supraj informoj oni trovos en la angla Vikipedio, ĉe [Global warming](#).)

\* La t.n. « antaŭindustria epoko » estis difinita de IPCC kiel la jaroj 1850–1900. IPCC estas la UN-a « Intergovernmental Panel on Climate Change ». France ĝi nomiĝas GIEC, t.e. « Groupe d’experts intergouvernemental sur l’évolution du climat ». La Esperanta traduko sugestata de Vikipedio estas « Interregistara spertularo pri klimata ŝanĝiĝo ». Kiu estas la mezuma antaŭindustria temperaturo ? Strange, malfacilas doni *precizan* respondon al tiu demando.



**Greta Thunberg renkontiĝis kun la urbestro de Montrealo kaj eĉ ricevis la simolan ŝlosilon al la urbo.**



Apenaŭ pli direblas, ol ke tiu temperaturo proksimas al 14 °C. Tio povas surprizi, sed montriĝas, ke la mezuma tuttera *vario* de iu jaro A al iu jaro B multe pli precize kalkuleblas ol la unuopaj mezumaj *absolutaj temperaturoj* de ambaŭ jaroj. Kial ? Se, ekzemple, en iu malgranda montara regiono ekzistas temperaturmezura stacio en iu valo kaj alia sur najbara altaĵo, la mezaj jaraj temperaturoj en ambaŭ lokoj povas esti sufiĉe malsamaj. Malfacilas kalkuli ian mezan temperaturon por tiu regiono dum la koncerna jaro, ĉar oni mezuris la temperaturon nur en du lokoj, ne en multaj. Sed, se jaro B estis ĝenerale pli varma ol jaro A en la vala stacio, ĝi montriĝos plej ofte pli varma ankaŭ en la altaĵa stacio, kaj la temperaturaltiĝoj (de jaro A al jaro B) en la valo kaj altaĵo estos multe pli proksimaj, ol estas iliaj absolutaj temperaturoj en ajna jaro. Tial la mezuma tuttera *vario* inter la jaroj A kaj B notinde pli precizas, ol unuopa mezuma tuttera *absoluta temperaturo*, ĉu en jaro A, ĉu en B. Vidu pliajn informojn pri tio [ĉi tie](#).

### **Notoj :**

<sup>1</sup> Antaŭa versio de tiu artikolo, verkita de Werner Fuß sola, aperis en *Monato* (2020/2, pp. 18–20), sub la titolo “La amikoj pravas, ne la klimat-skeptikulo”, kiel respondo al antaŭa artikolo verkita de klimat-skeptikulo. Sed, pro tio, ke

multaj aspektoj, kaj eĉ kelkaj bazaj principoj, povus elvoki pli ĝeneralan interesiĝon, Francisko Lorrain — kunlabore kun Werner Fuß — adaptis la artikolon tiurilate por la legantoj de la revuo *La Riverego*. Werner Fuß estis dum multaj jaroj esploristo en la Instituto Max Planck pri Kvantumoptiko en Garching ĉe Munkeno, sed delonge aktive interesiĝas pri la klimato. Vidu liajn antaŭajn artikolojn en [Monato](#) : 1988/3 p. 19, 2011/3 p. 20, 2011/4 p. 17. Franca traduko de ĉi tiu artikolo de La Riverego publikiĝis en *Acfas Magazine* (2020-10-13).

<sup>2</sup> Laŭ tiu leĝo, forme tre simpla, la elradiata energio estas proporcia al la kvara potenco de la temperaturo :  $E = kT^4$ , kie  $T$  estas la temperaturo laŭ la kelvina skalo.

<sup>3</sup> Pli precize, en ĉiu kvadrata metro orta al la direkto de la suno, same distance de la suno ol nia planedo. Temas pri sufiĉe granda energifluro, sufiĉa por senĉese lumigi pli ol 13 cent-vatajn lampojn en ĉiu kvadrata metro ! Tamen direndas ĉi tie, ke la *luma* energio elradiata de tiuj lampoj estus multe malpli granda ol tiu alvenanta de la suno — ĉar nur malgranda parto de la energio konsumata de tia lampo transformiĝas al lumo !

<sup>4</sup> La « antaŭindustria epoko », laŭ la difino de IPCC, ampleksas la jarojn 1850–1900.

# Traduko de la Urantia Libro al Esperanto

*Marteno Benoit*

Mi estas parto de tri-kontinenta skipo, kiu komencis la sufiĉe ampleksan taskon traduki kaj revizii la Urantian Libron de la angla al Esperanto. La Urantia Libro estas 2097-paĝa, kaj enhavas kompleksajn konceptojn pri spirito, filozofio kaj religio. Ni unue renkontiĝis rete en fino de majo por komenci akordiĝi pri la traduko de 1330 vortoj kaj konceptoj, el kiuj pluraj ekzistas nur en la libro mem.


La Urantia Libro fakte jam estis tute tradukita de JeanMarie Chaise al Esperanto komence de la 2000-aj jaroj, sed li subite mortis. Jean Annet, iama prezidanto de la Belga Franclingva Urantia Asocio dum pli ol 15 jaroj, decidis repreni la taskon revizii la tradukon de s-ro Chaise. Li trovis aliajn homojn pretajn helpi pri tiu projekto. Estas Lucas Perier, vicprezidanto de la Urantia Asocio de Francio, kiu jam tradukis 20 ĉapitrojn de la libro ; Yves Nevelsteen, iama prezidanto de la Flandra Esperantista Junulara Asocio, iniciatis la Komputekon, prikomputila terminokolekto kadre

de E@I, kaj aktivas kiel redaktanto en la Vikipedio en Esperanto ; Anna Lobo de Carvalho el Brazilo, kiu jam tradukis la 10 unuajn ĉapitrojn de la libro ; kaj mi, Marteno Benoit el Kanado, kiu mem

tradukis unu ĉapitron de la libro, ekkreis terminaron pri neologismoj de la Urantia Libro, kaj konas Esperanton kaj la Urantian Libron de preskaŭ 20 jaroj.

La Urantia Libro unue eldoniĝis en 1955 de anonima aŭtoro, kaj estis tradukita en 23 lingvojn, inkluzive de la japana, korea, hebrea, rusa kaj indonezia lingvoj. La libro estis verkita kvazaŭ rekte prezentita de pluraj ĉielaj estuloj mandatitaj doni

religian revelacion al la loĝantaro de la Tero. Estas tre malfacile kontentige resumi la enhavon de la libro, ĉar ĝi entenas multajn buntajn konceptojn, kiuj estas profundaj kaj malfacile klarigeblaj. Ĝi interalie klarigas la fizikan kaj spiritan strukturon de la tuta universo, la naturon de Dio kaj la Triunuo, kaj la buntajn klasojn de diversspecaj



anĝeloj kaj spiritoj, la historion kaj evoluon de nia planedo, kaj la vivon kaj instruon de Jesuo. Ĝi asertas, ke ekzistas miliardoj da planedoj en la universo, en kiuj loĝas inteligentaj dukruraj homoj, kaj ke ekzistas Penso-Ĝustigantoj, eroj de Dio, kiuj spirite loĝas en nia menso por malrapide evoluigi nin spirite kaj personece. Ĝi akordas kun multaj sciencaj faktoj, kiel ekzemple la malrapida biologia evoluo ekde bakterio ĝis homo.

Mi unue aŭdis pri la Urantia Libro preskaŭ samtempe, kiel mi aŭdis pri Esperanto, en retbabilejo. Estis filozofia diskuto, kaj iu donis al mi la ligilon al la retejo de la Urantia Libro. Tiam, estante ateisto, mi komencis legi kelkajn ĉapitrojn, kaj, sen pretendi, ke la libro estas absoluta vero, mi komencis trovi multan sencon en ĝi : ekzemple ke ekzistas vivo post la morto, kaj ke ni daŭrigos nian evoluon sur duonfizikaj planedoj, post kiam ni mortos sur ĉi tero. Ĝi donis al mi pli firman grundon por vivi plene, kaj labori pri mia evoluo, kreski kiel bona kaj vera homo. Tial mi decidis



kredi je ĝi, kvazaŭ mi saltus kun elasta ŝnuro, kaj mi ne bedaŭras ĝis nun !

Tial mi decidis helpi pri la traduko de la libro al Esperanto. La esperanta kaj urantia movadoj estas plursence similaj : subgrundaj, sed kun mondaj kaj naciaj kongresoj. Mi malpli ĉeestas la urantian movadon, sed mi kelkfoje ĉeestis spontanajn

studgrupojn, kaj alie mi sufiĉe kontentis legi la libron sole. La kerno de la urantia movado estas la studgrupoj, da kiuj estas plurcentoj tra la mondo. Ligi du pasiojn miajn estas preskaŭ pura revo, kaj trovi tiajn similajn homojn, kiuj verŝajne estas malmultegaj en la mondo, estas bela spirita sperto ! Sed la tasko estos tre longa, verŝajne pli ol kvinjara, eble multe pli.

Sed kun mia novtrovita diligenta kolegaro, mi bone esperas, ke ni iam sukcesos.

55:3:22 (626.11) « Neniu evolua mondo povas esperi progresi preter la unua stadio de establiĝo en la lumo, ĝis ĝi atingos unu lingvon, unu religion kaj unu filozofion. »



# Esperanto-Societo Kebekia | Société québécoise d'espéranto

La Riverego estas eldonata de la Esperanto-Societo Kebekia kvarfoje dum la jaro : marte, junie, septembre kaj decembre. Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Oni rajtas kopii la artikolojn, kun nepra indiko de la fonto. Senpage por la membroj de la ESK. UEA-kodo de la Societo: kebk-d.

**Redaktado kaj grafiko** : Yevgeniya (Ĵenja) Amis (riverego(ĉe)esperanto.qc.ca). **Korektado kaj lingva konsilado** : Silvano Auclair, Francisko Lorrain, Bob Williamson. **Estraranoj de ESK** : Nicolas Viau (prezidanto), Normand Fleury (vic-prezidanto), Sylvain Auclair (sekretario-kasisto), Joel Amis (konsilanto), Garry Evans (konsilanto).

La Riverego (Le Fleuve) est publié par la Société québécoise d'espéranto quatre fois par année, en mars, juin, septembre et décembre. Dépôts légaux aux Bibliothèques nationales du Canada et du Québec. Premier trimestre 1986. ISSN 1923-1067. Le contenu des articles est sous la responsabilité des auteurs. La reproduction des articles est permise, avec mention obligatoire de la source. Gratuit pour les membres de la Société québécoise d'espéranto.

**Rédaction et graphisme** : Yevgeniya Amis (riverego(à)esperanto.qc.ca). **Correction** : Sylvain Auclair, François Lorrain, Bob Williamson. **Administrateurs de la SQE** : Nicolas Viau (président), Normand Fleury (vice-président), Sylvain Auclair (secrétaire et trésorier), Joel Amis (conseiller), Garry Evans (conseiller).

6595, rue Briand, Montréal H4E 3L4 | info(ĉe)esperanto.qc.ca • www.esperanto.qc.ca

En plus de la Société québécoise d'espéranto, il existe au Québec plusieurs clubs d'espéranto. Pour ajouter votre club à cette liste ou annoncer une activité, écrivez-nous à riverego(à)esperanto.qc.ca

**Vizitu nian retejon !**

**Visitez notre site web !**

[www.esperanto.qc.ca](http://www.esperanto.qc.ca)



Aliĝu tuj, se vi volas esti gastiganto kaj bonvenigi esperantistojn ĉe vi :

**[www.pasportaservo.org](http://www.pasportaservo.org)**

Vi povas ankaŭ kontakti Jed-on Meltzer <jedmeltzer@gmail.com>, kiu estas la peranto por Kanado.